

HORIZONTO

II-a JARO N-o 10 (4)
JULIO - AŬGUSTO 1977

ARTURA KAJ INFORMA REVUO



KRONBORG

LAJ RENKONTIĜO DE AŬDACOJ!

SAGECO

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Fernando de Diego
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76
N.º 4 - Julio - Aŭgusto 1977

ENHAVO

«PROLETA INTERNACIIISMO» KONTRAŬ
HUMANECAN INTERNACIIISMON (Ivo
Lapenna)
UNU RENKONTIGO DE AŬDACOJ (Jean
Thierry)
PRI LA TRADUKO DE «DON QUIJOTE
DE LA MANCHA» (I. Gastón)
KRONBORG (H. V. Rasmussen)
KOMUNIKO DE LA REDAKCIO
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)
Redaktas (Ivo Lapenna)
GRAVA AGADO DEFENDE AL LA HOM-
RAJTOJ. Kompilis: (F. Munniksma)
HOMAJ RAJTOJ EN LA EŬROPA KON-
SILIO (Jean Thierry)
BELETRO
Sageco (trad. Roger Bernard)
Revenis el nigro (trad. Jam Smykalski)
El la Jida Religia Poezio (trad. kaj ko-
mentis N. Z. Maimon)
P-Litero (trad. Eva kaj B. Golden)
ESPERANTO KAJ LA NACIAJ LINGVOJ
(Daniel Luez)
KELKAJ INFORMOJ KAJ SUGESTOJ
PRI LA MANIFESTO 77 DE LA ESPE-
RANTO-MOVADO (I. Lapenna)
KION VI NE LEGOS ALILOKE
Malfermiĝa letero al la estraro de UEA
(S. Sakellaropoulos)
MALLONGE
TRA LA ESPERANTO GAZETARO
Redaktas (Jean Thierry)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marina
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĉk.
Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ
la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.
Britujo:
Geoffrey King, 12 Elmer Close, ENFIELD
Middle EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9196. Jarabo-
no 5 £.
Danlando:
Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700
BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Biku-
ben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono:
60,— D Kr.
Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono:
38,— F. Mk.
Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.
FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,
D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120
854301. Jarabono: 24,— DM.
Grekujo:
K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave.,
NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro.
040-753362-40, Nacia Banko de Greklando
Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.
Hungario:
Tibor Szabadi, Pf. 66, H-8800 NAGYKA-
NIZSA. Jarabono: 180,— Ft.
Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 445854-8.
Jarabono: 84 izr. liroj.
Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO,
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.
Luksemburgo:
Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L -
OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse
d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380, luk-
semburgaj frankoj.
Nederlando:
Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstra-
at, 172, HAGO 2011, Poŝtkonto 162626. Jara-
bono: 25 Gld.
Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

“PROLETA INTERNACIIISMO” KONTRAŬ HUMANECAN INTERNACIIISMON

1. Enkonduko

En ĉap. 3.2 de *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en UEA* estas koncize prezentita la partipolitika doktrino de «proleta internaciismo», kiu nun senreziste jubilas en la sino de UEA mem. Tute egale, ĉu tiu «proleta internaciismo» estas eksplicite menciita aŭ ne kiel deviga principo de agado en la programoj kaj/aŭ statutoj de la koncernaj Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj, la praktikaj aktivadoj de iliaj altruditaj gvidantoj interne de UEA kaj ekster ĝi estas konformaj al la doktrino laŭ la striktaj postuloj de tiuj partipolitikaj faktoroj, de kiuj la «gvidantoj» plene dependas.

Kompreneble, por efike propagandadi la politikon de «proleta internaciismo», necesas atakadi laŭ la jam bone elprovitaj metodoj, ĉiujn aliajn aspektojn de internaciismo, precipe la plej vastan kaj realan, respondantan al la objektivaj evolukondiĉoj de la homaro, nome la tuthoman, humanecan internaciismon. Tion oni abunde faris kaj plu faras.

Ekzemple, D. Blanke skribis en *der esperantist*, n-ro 5/1976: «Do Esperanto, kiel ĉiu ajn lingvo, estas unuavice ilo, kaj nenio alia... Esperanto kiel lingvo ne povas esti esprimo por iu ideologio, nek por la 'interna ideo', nek por iu 'humanisma internaciismo', per kiuj iuj volas anstataŭi la proletan internaciismon» (p. 13). Kaj li moke aldonis en parentezoj: «Paralele, cetere, al la tiel nomata 'socialismo kun homa vizago', konata afero», evidente aludante al la demokrata socialismo, kiun Dubček, apogita de la vastaj tavoloj de la popolo, estus enkondukinta en Ĉeĥoslovakion, se la invado de 1968 (en kiu partoprenis ankaŭ la trupoj de la lando de D. Blanke, nun mi aldonu en parentezoj, sed senmoke) ne estus haltigintajn tiun esperigan procezon. Fakte, neniu volas «anstataŭi proletan internaciismon per humanisma internaciismo», sed, inverse, iuj *ja anstataŭas* la humanecan internaciismon per «proleta internaciismo» ĝuste en UEA mem, kontraŭe al ĝiaj laŭstatutaj celoj (art. 3) kaj baza principo de partipolitika neŭtraleco (art. 4).

Mi citis D. Blanke ne tial, ĉar li estus pli signifa, kvankam sendube iom pli klera, ol kiu ajn alia el la protagonistoj de «proleta internaciismo», sed tial ĉar li, aldone al siaj funkcioj en la Kulturligo de GDR, estas unu el la tri estraranoj (la du aliaj estas U. Lins kaj J. Pool) en la nuna CED, kiu, escepte de la nomo, havas nenion komunan kun la antaŭhamburga Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (unu el ĝiaj nunaj celoj, se entute ĝi okupiĝas pri siaj celoj, estas «plurlanda kaj mondskala lingvoplanado!»).

Aliflanke, en la lastaj tri jaroj sufiĉe multaj personoj petis min klarigi iom detale kio fakte estas la doktrino de «proleta internaciismo» kaj kial ĝi kontraŭas la idearon de humaneca internaciismo, kies esprimo kaj fortikiganto estas la Internacia Lingvo. Nun, antaŭ la 3-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, pritraktonta kiel unu el la du ĉeftemoj la ideajn aspektojn de la esperantismo en la lumo de la aktuala krizo en la Esperanto-Movado, estas, do, taŭga momento por doni respondon. Ĝi servu ne sole kiel enkonduka diskutraporto, sed ankaŭ kiel dokumento prezentita por pripenso al ĉiu sincera esperantisto.

2. Originoj de «proleta internaciismo»

La lastaj vortoj de la *Komunista Manifesto* tekstas: «La regantaj klasoj tremu antaŭ komunista revolucio. La proletoj havas nenion por perdi escepte de siaj ĉenoj. Ili havas mondon por konkeri. Laborantaj homoj de ĉiuj landoj, unuigul!».

Tiuj vortoj ne estas malplenaj frazoj aŭ nuraj sloganoj, formulitaj por iuj dumtempaj politikaj celoj, sed konsistigas unu el la fundamentaj elementoj de la revolucia marksisma teorio. Laŭ la *Manifesto*, la moderna industria laboro kaj la subigo de tiu laboro al kapitalo estas la sama en Anglio, kiel en Francio, en Ameriko, kiel en Germanio, en ĉiuj kapitalistaj landoj. Tiu fakto senigis la proleton «de ĉiu spuro de nacia karaktero». Al tiuj, kiuj «riproĉadis la komunistojn», ke ili deziras aboli landojn kaj naciojn, la *Manifesto* respondis: «La laborantaj homoj ne havas sian landon» kaj tial «ni ne povas forpreni de ili tion, kion ili ne havas». Tial la komunistoj «emfazas kaj metas sur la unuan lokon la interesojn de la tuta proletaro, sendepende de kiu ajn nacieco»*.

El la tuta marksisma doktrino sekvas, ke Marx kaj Engels komprenis proletan internaciismon kiel internacian solidarecon de la laboristaro en ĝia klasa batalo kontraŭ la burĝaron, kontraŭ la kapitalistan klason kaj ĝian internacian solidarecon rilate konservon de kapitalismo, do kontraŭ la tutan kapitalisman socion. La internacia klasa solidareco, bazita sur proleta internaciismo, ne estas nur organiza postulo, sed postulo determinita de la kapitalisma maniero de produktado, kiu necese, konforme al la dialektiko de historia materialismo, kondukas la homaron al internaciismo. La naciaj diferencoj kaj antagonismoj inter la popoloj — asertas la *Manifesto* — estas malaperantaj pro la evoluo de la burĝaro, pro la libereco de komerco, la monda merkato kaj la unuecigado de la produktmaniero. Ĉiuj-ĉi faktoroj kaŭzas korespondajn ŝanĝojn en la viv-

kondiĉoj kaj tial ankaŭ en la pensmaniero. La aŭtoroj de la *Manifesto* atendis, ke «la superrego de la proletaro kaŭzos, ke ili malaperos eĉ pli rapide».

La monde internacia klasa solidareco de la laboristaro estis anstataŭigonta la nacian solidarecon aŭ, minimume, estus devinta montriĝi pli forta en kazo de konflikto inter la internacia klasa solidareco kaj nacia lojaleco. El tiel komprenata klasa solidareco devis sekvi reciproka helpo de la laboristaro tra la tuta mondo, malebligo de militoj bazitaj sur naciaj interesoj kaj, fine, kreiĝo de monda senklasa socio.

El tiu konciza prezento vidiĝas klare, ke la marksisma koncepto de «proleta internaciismo» estas nete klasa koncepto, kontraŭstarigita al la «burga internaciismo» de la kapitalista klaso. Ĝi estas multe pli malvasta ol la tuthomara, humaneca internaciismo. Tamen, senkonsidere al la ĝusteco aŭ malĝusteco de tiel krude starigita distingo inter la «proleta internaciismo» kaj «burgakapitalista internaciismo», la rimarko pri la internaciismaj evolutendencoj pro la internacia komerco, monda merkato kaj uniformiĝo de la produktmaniero, alivorte pro la ekonomika interdependeco de la mondo, estas sendube ĝusta. Ni nur aldonu, ke pro la samaj faktoroj ne nur ĉiam pli sentigis la bezono pri neŭtrale homa lingva komunikilo, sed ankaŭ kreiĝis kaj ĉiam pli kreiĝas internacia lingvomaterialo, kiu fakte ebligis la ekeston kaj formiĝon de la Internacia Lingvo. Tiu demando estas abunde kaj science pritraktita en nia literaturo, inkluzive la dokumentojn de la antaŭhamburga CED kaj miajn proprajn verkojn, tiel ke sufiĉas nur mencii tion.

Ĉar D. Blanke kaj aliaj «marksistoj» kaj adeptoj de la «proleta internaciismo» en la t.n. «socialismaj landoj» devas paroli la marksisman lingvon, aŭ, pli precize, la marksisman-leninisman lingvon (pli frue ankaŭ la stalinisman), dum mi, se necese, povas paroli ankaŭ tiujn lingvojn en seriozaj debatoj, ili agas tre saĝe, se ili studus iom pli profunde la originalan marksisman koncepton de proleta internaciismo por mem konstati ĝis kiu grado ĝi estas aplikata inter la landoj de la soveta bloko. Provizore ni lasu tion kaj ni vidu kio okazis al tiu koncepto en Soveta Unio.

3. Soveta koncepto

Sub la regado de Stalin, internaciismo en la ordinara senco de la vorto estis nomata «burga kosmopolitismo» kaj rigardata kiel grava ideologia deĵo. Male, la «ĝusta» internaciismo estis nomata «proleta internaciismo» kaj difinita en 1927 de Stalin mem jene:

«Internaciisto estas tiu, kiu senrezerve, senhezite, senkondiĉe, estas preta protekti USSR, ĉar USSR estas la bazo de la monda revolucia movado, kaj protekti, progresigi tiun revolucion movadon ne estas eble sen protekti USSR. Ĉar tiu, kiu pensas, ke li protektas la mondan revolucion movadon aparte de USSR kaj kontraŭ ĝi, iras kontraŭ la revolucion kaj necese glitas en la tendaron de la malamiko de la revolucio.» (J. V. Stalin, *Soĉinenija /Verkoj/ Moskvo, 1953, vol. 10, p. 51.*)

Tia koncepto de «internaciismo» estas ne nur pli mallarĝa ol la originala marksisma, sed, fakte, kontraŭa al ĝi. Dum la marksisma koncepto, kvankam unuklasa, tamen estas egaleca kaj tutmonda, la stalinisma estas malvaste naciisma, metita en la ekskluzivan servon de la soveta eksterlanda politiko. Kuplita kun la teorio de la «pli aĝa frato» (la rusa) en rilato al la «pli junaj» (ĉiuj aliaj nacioj en USSR), la stalinisma «proleta internaciismo» estas nenio alia ol teoria pravigo de la grandrusa naciismo en Soveta Unio mem (kun ĉiuj akompanaj fenomenoj de naciismo, inkluzive altrudado de la propra lingvo), kaj por absoluta regado de Moskvo, t.e. de la partia pinto, super la alilandaj komunistaj partioj. Ekstera esprimiĝo de tiu kontraŭmarksisma koncepto, eĉ pli malproksima de la humaneca internaciismo aŭ internaciismo en la ordinara senco de la vorto, estis la formiĝo de la monda t.n. «monolita komunisma bloko» kiel potenca instrumento de la soveta naciisma politiko. Kiel seriozaj studentoj de internaciaj rilatoj antaŭvidis longe antaŭ la Dua Mondmilito, tia ekstrema naciismo devis kun la tempo elvoki reagojn fare de la aliaj komunistaj partioj. Tio fakte okazis kaj hodiaŭ la stalinisma «monolita bloko» jam eniris la historion.

La bloko jes, sed la «proleta internaciismo» ne. Al la stalinisma koncepto L. Breĵnev aldonis plian elementon: tiun de «limigita suvereneco» de la t.n. «socialismaj ŝtatoj». Kun tiu aldono la «proleta internaciismo» fariĝis eĉ fundamenta principo de la t.n. «socialisma internacia juro», kiu, laŭ la nuna soveta doktrino, reguligas la «fratajn rilatojn inter la landoj de socialismo». La kvintesenco de la nuna koncepto de «proleta internaciismo» estis formulita de L. Breĵnev en parolado de la 12-a de novembro 1968 en Varsovio por pravigi la intervenon en Hungario kaj la invadon de Ĉeĥoslovakio. Interalie li diris:

«Kiam internaj aŭ eksteraj fortoj, kiuj estas malamikaj al socialismo, klopodas renversi la evoluon de iuj ajn socialismaj lando cele al reestablo de la kapitalisma sistemo; kiam ekestas minaco por la afero de socialismo en tiu lando, kaj minaco por la sekureco de la socialismaj komunaj landoj, tiam ĝi ne plu estas nur problemo por la popolo de tiu lando, sed ankaŭ komuna problemo, kiu koncernas ĉiujn socialismajn landojn.» (Laŭ *Soviet News /Sovetaj Novaĵoj/ de 19.11.1968.*)

La soveta doktrino unuanime (kompreneble) subtenas tiun teorion de limigita suvereneco, bazitan sur la breĵneva principo de «proleta internaciismo». E. T. Usenko eksplite mencias la armitajn intervenojn en Hungario (1956) kaj en Ĉeĥoslovakio (1968), kiujn li nomas «eventoj», kiel «tipajn ekzemplojn de reciproka helpo de socialismaj ŝtatoj en la batalo por la paco kaj en la rezisto al la intrigoj de imperialismo», kvankam eĉ politikaj paseroj scias, ke nek «imperialisma invado», nek «imperialismaj intrigoj» minacas la du landojn, sed iliaj popoloj nur deziris havi siajn proprajn formojn de socialismo «kun homa vizaĝo». G. I. Tunkin, la ĉefa laŭtparolilo de la soveta interna-

cijura doktrino, estas eĉ pli eksplicita, kiam li asertas, ke «la aktivadoj de la kvin socialismaj ŝtatoj en aŭgusto 1968 /invado de Ĉeĥoslovakio, *mia rim.*/ ... estis plene konte kontraŭjuraj armitaj intervenoj kiel «plian agon en la ideologia lukto de la imperialismo kontraŭ socialistan kunlaboradon».

Nu, S. Avramov, certe ne «agentino de imperialismo», sed profesorino en la universitato de la ĉefurbo de Jugoslavio, nun denove rekonata kiel «socialisma lando», klasigas la intervenojn en Hungario kaj Ĉeĥoslovakio kiel «skandalajn ekzemplojn, kiuj montras perforton, ne toleremon kaj socialisman spiriton en solvado de problemoj pace». Similan starpunkton havas tuta aro da «socialismaj» landoj, kelkaj pli eksplicite ol aliaj, eĉ por ne paroli pri la komunistaj partioj en demokrataj landoj, kiuj nun malakceptas la koncepton de «proleta internaciismo»**.

Tia «proleta internaciismo» estas eĉ pli naciisma ol la stalinisma. Dum la stalinisma postulis nur absolutan obeon al la ordonoj de la soveta partia pinto, la nuna koncepto, aldone, pravigas armitan intervenon sub la masko de «frata helpo». Tio, malgraŭ la nomo, ne plu estas internaciismo en kiu ajn senco, inkluzive la marksisman klasan solidarecon de la tutmonda laborularo, sed reakcia partipolitika doktrino de ekstrema naciismo, kiu pravigas eĉ agreson kontraŭe al la solvoj antaŭviditaj en la Carto de UN. Altrudita al la ŝtatoj en la soveta bloko (Rumanio tamen rezistas) kaj sklaviga por iliaj popoloj, ege danĝera por la t.n. «socialismaj landoj» ekster la bloko kaj tial forjetita de iliaj gvidantoj, la doktrino de «proleta internaciismo» prezentiĝas samtempe kiel la plej serioza minaco al la monda paco.

4. Kontraŭ humanecan internaciismon

La reakcia «proleta internaciismo», altrudita de la partipolitikaj faktoroj al nombro da Esperanto-instancoj en la landoj de la soveta bloko, estas nuntempe vaste propagandata ankaŭ en la kadro de UEA, sen kia ajn rezisto aŭ kritiko fare de la respondecaj organoj de la Asocio, aŭ almenaŭ fare de ĝiaj unuopaj funkciuloj. Paralele kaj konforme al la ĝenerala direktivo «akrigi la ideologian lukton en kondiĉoj de malstreĉiĝo — la zamenhofa humaneca internaciismo, do unu el la esencaj kaŭzoj de la socia enradikiĝo de Esperanto, estas atakata per ĉiuj eblaj rimedoj, ekde kontraŭsciencaj argumentoj ĝis vulgaraj ridindigoj (v. precipe ĉap. 4.3 kaj 5.1 de *Hamburgo en Retrospektivo*). Tio estas tute natura, ĉar la naciisma soveta «proleta internaciismo» estas ekskluziva kaj tial necese kontraŭa al la tuthomara, egaleca, humaneca internaciismo kiel idea reflektiĝo de la objektivaj materiaj kondiĉoj de kreskanta interdependeco, kiuj en la lasta linio determinas la integriĝadon sur ĉiam pli alta nivelo ĝis la tutmonda socio de la estonteco sen naciismaj antagonismoj. Lingva esprimo de tiu humaneca internaciismo, kiun Zamenhof, laŭ mi iom neadekvate, nomis «interna ideo», estas la Internacia Lingvo. Aliflanke, same kiel ĉiu alia lingvo efikas kulture, solidarige, en rilato al la socia grupo uzanta ĝin por siaj komunikado kaj pensado (gento, tribo, kasto, klaso, religio, nacio, k.a.), tiel same la Internacia Lingvo, pro sia karaktero de internacia komunikilo, en la nuna stadio progresigas la integriĝadon en tuthoman socion kaj fortikas la tuthoman, humanecan internaciismon. En tiu senco — nur en tiu senco — oni novas paroli pri la solidara rolo de la Internacia Lingvo, alivorte pri la humaneca internaciismo ligita al ĝi.

La moderna humaneca internaciismo, naskita komence de la 19-a jc. kiel kromprodukto de la industria revolucio kaj nuntempe impete altrudiĝanta — do, idea manifestiĝo de la impone kreskantaj materiaj fortoj, kiuj necese kondiĉas la longan procezon al tuthomara integriĝo — estas ankaŭ la ideo fono de la Internacia Lingvo. «Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo» (Zamenhof, *Originala Verkaro*, p. 372). La emfazo je «frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj» estas de Zamenhof mem. La tuta impona verko de Zamenhof, ekde la gimnazia «*Malamikeco inter la nacioj falu, falu, jam estas tempo!*» (1878) ĝis lia *Letero al Diplomatoj* (1915), estas inspirita de humaneca internaciismo. Ĝia kvintesenco estas plej trafe formulita en unusola simpla frazo, eldirita en la parolado al la Unua Esperanto-Kongreso en 1905: «Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marŝo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed *homoj kun homoj*» (mia substreko). Tio estas la kerno de humaneca internaciismo, absolute konforma al la materiaj fortoj nutranta la integriĝan procezon, en kiu neŭtrale homa lingvo ludas pozitivan, solidarigan rolon kaj, eĉ pli, sen kiu la unueca homaro de la estonteco surbaze de frateco inter la popoloj kaj egaleco inter la nacioj ne estas realigebla.

D. Blanke kaj aliaj «proletaj internaciistoj» en UEA mem senlace atakas tiun koncepton, science korektan, per misprezentado kaj pseŭdosciencaj argumentoj. Ekzemple, li asertas, ke «lingvo estas instrumento de komunikado, de la ekkonado kaj de la pensado, sed lingvo *ne* estas ideologio» (*der esperantist*, n-ro 5/1976, p. 13), implicante tiel, ke Zamenhof aŭ kiu ajn alia serioza persono estus kiam ajn dirinta tian stultajon, ke Esperanto aŭ kiu ajn lingvo estas *ideologio*. En la sama n-ro D. Blanke ankaŭ asertas, ke «Zamenhof supertaksis ĝuste la kapablojn de la lingvo por la solvo de sociaj problemoj kun senlingva karaktero», kvankam Zamenhof tute ne supertaksis tiujn «kapablojn», sed klare diris en Genevo en 1906:

«Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento taros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltreado.»

Tiu citaĵo de Zamenhof donas ankaŭ respondon al plia aserto de D. Blanke sur la sama paĝo: «Mi ankaŭ konas, cetere, esperantistojn, kiuj sentas reciproke nenion solidarigan kaj pere de la 'kara lingvo' interbatalis. Ili sin malamas». Guste, kvankam tre bedaŭrinde. Tio, tamen, neniel pravigas lian plian aserton, ke «Esperanto *el si mem* do ne havas iun 'solidarigan funkcion', kiu aŭtomate efikadas kaj ke «aserti tion, estas konscia nebuligo». Fakte, intermiksi la solidarigan, kuntenan *socian* rolon de kiu ajn lingvo en rilato al la *koncerna lingva komunaro*, unuflanke, kun malhonesteco, avido, krimeco, malamo kaj aliaj negativaj roloj interne de la grupo, aliflanke, por «pruvi» la neekziston de tiu socia rolo, signifas aŭ nenion kompreni en tiu sfero, aŭ konscie nebuligi sciencajn verojn. En ĉiu okazo ĝi estis necesa al la artikolverkinto por la konkludo farita en formo de sugestia retorika demando: «Ĉu ne ekzistas forta internaciisma sento inter komunistoj de diversaj landoj eĉ sen *lingva* kompreniĝo?». Kompreneble, oni facile povus demandi la aŭtoron, kie li trovis tiun «fortan internaciisman senton inter la komunistoj de diversaj landoj», ĉu, ekzemple inter tiuj de Ĉinio kaj Soveta Unio; aŭ de kiuj landoj al kiuj landoj oni riskas siajn vivojn por fuĝi malgraŭ la berlina muro kaj la pikdratoj kun maŝinpaŝoj turoj laŭlonge de la limoj, kaj kiu konstruigis tiujn instalaĵojn: ĉu la «imperialistoj» aŭ la «proletaj internaciistoj». Oni povus ankaŭ demandi, ĉu fakte la aŭtoro kaj liaj samopinianoj estas tiel naivaj, ke ili tute ne vidas la realaĵojn, aŭ estas devigataj ne vidi ĝin. Sed ni rezignas pri tiuj kaj multaj similaj demandoj, sekve ankaŭ pri la respondoj, ĉar ili en tiu ĉi kunteksto ne interesas nin. Interesa kaj pli ol maltrankviliga estas nur la fakto, ke la protagonistoj de tiu reakcia doktrino de «proleta internaciismo» nun libere aktivis en UEA, troviĝas en ĝiaj organoj kaj okupas funkciojn en decidaj pozicioj. Maltrankviliga kaj forte kondamninda estas la anstataŭigado de science bazita humaneca internaciismo per la partipolitika «proleta internaciismo», kiu, aldone al ĉio cetera, prezentigas kiel grava obstaklo al plua integriĝado de la homaro surbaze de rasa kaj nacia egaleco.

5. Konkludo

La politikigo de UEA per la kontraŭstatuta penetraĵo de la fremda «proleta internaciismo» en ĝian strukturon kaŭzis nur grandan malbonon, sen ereto da bono por Esperanto, ĉar ne en la landoj de la bloko. Ĝi senigis la Asocion de ĝia laŭstatuta partipolitika neŭtraleco; malaltigis ĝian prestiĝon kaj kompromitis la imagon de la Esperanto-Movado en la publika opinio; necese kaŭzis interne de la Asocio disrompojn, senprecedence rapidan malfortigon pro la ĉesigo de praktike ĉiuj antaŭhamburgaj aktivadoj laŭ realecaj agadprogramoj, perdon de multaj valoraj aktivuloj, teruran malgrandigon de la nombro de individuaj membroj; mortigan apation ĉie.

En la landoj de la bloko la pozicioj de Esperanto neniel plifortiĝis post Hamburgo. La ĉefroluloj de la konspiro (Aleksiev, Sviták, Swistak, Berceli, k.a.), farinte sian «laboron», foriris aŭ estis forigitaj. En Soveta Unio ankoraŭ ne ekzistas kia ajn Esperanto-organizaĵo; en GDR la Laborrondo plu estas sekcio de la ŝtata-partia Kulturligo; en aliaj landoj, precipe en Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio, la Esperanto-instancoj troviĝas sub strikta kontrolo de la partio. Financa kaj politike ili plene dependas de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj kaj ĉiumomente povas estis ĉesigitaj per dulinia dekreto. Tio facile povas okazi, se la aŭtoritatoj konstato, ke iliaj esperoj ligitaj al la ekkapero de UEA ne realiĝis tiel plene, kiel ili atendis. Kaj tiuj esperoj neniam plene realiĝos ĝis ekzistas *Horizonto* kiel gardanto de la tradiciaj valoroj de la Esperanto-Movado, ligitaj al humaneca internaciismo.

Fine, la apliko al Esperanto de pseŭdosciencaj tezoj, laŭ kiuj lingvo estas nur «ilo, kaj nenio alia», kaj tial havas «nenian solidarigan funkcion», malfermis la pordon al amatoreca «planlingvismo» kaj «interlingvistikismo», nun disvastiĝantaj en la Esperanto-Movado. La ekregado en la posthamburga CED de tiuj eraraj tezoj, neataj de la tuta lingva realaĵo en la mondo, senigis la Esperanto-Movadon de la sola institucio, kiu surbaze de faktoj kaj sciencaj analizoj aperte kaj sukcese pledis por la Internacia Lingvo kaj ĝia pozitiva rolo en la socio. La afero estas tiel detrua por la pozicioj de Esperanto kaj tiel grava por ĝia estonteco, ke plia longa artikolo estos necesa.

Mallonge, la tuta situacio montras ĉiurilatan profundan krizon de la Esperanto-Movado. La sola eliro estas ne fondo de paralela organizaĵo, kiel iuj proponas, sed la reveno de UEA, se tio ankoraŭ eblas, al la laŭstatuta tradicia linio, krude interrompita en Hamburgo.

Tiom por serioza konsidero de ĉiuj partoprenantoj de la Tria Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Humlebæk, kaj ankaŭ de ĉiuj sinceraj esperantistoj en Reykjavík.

Ivo Lapenna

* Ĉiuj citaĵoj el la *Manifesto de la Komunista Partio* konforme al K. Marx kaj F. Engels, *Selected Works in One Volume* (Selektitaj verkoj en unu volumo), 1968, p-oj 31-63, speciale p-oj 44-46, 51, 63.

** Por pliaj detaloj kaj analizoj v. I. Lapenna, «The Soviet Concept of 'Socialist' International Law» (La Soveta Koncepto de 'Socialisma' Internacia Juro), *The Year Book of World Affairs* (La Jarlibro pri Mondaj Aferoj), London, 1975, p-oj 242-265.

UNU RENKONTIĜO DE AŬDACOJ!

Se la kreintoj deziris, ke ilia kreaĵo precipe ŝoku, almenaŭ surprizu, kaj estu kiel eble plej diskutata, ili ja sukcesis.

Aŭdaca estis jam la iniciato de Georges Pompidou, kiam en 1969 li decidis, ke «La Centro devos enteni ne nur vastan muzeon de pentrarto kaj skulptarto, sed specialajn instalaĵojn por muziko, disko kaj eventuale kinarto kaj teatra reserĉado».

Aŭdaca estis la 15-an de julio 1971 la projekto elektita de internacia juĝantaro, kiu premiis tridek proponojn kaj kronis tiun de s-roj Piano (italo), Rogers (anglo) kaj Franchini (italo), helpataj de la etudejo «OVE ARUP and PARTNERS».

Aŭdaca estis la konstruado de kvin etaĝoj el metalaj traboj kaj stangoj kun betonaj slaboj sur trietaĝa infrastrukturo en la grundo (el armita betono kaj el 40.000 tunoj da ŝtalo); — la tuto (vidu la foton) efektiviĝis de aprilo 1972 (per formeto de 100.000 m³ da tero) ĝis la fino de 1975.

Aŭdaca estis ankaŭ la kosto de la konstruado (900 milionoj) kaj estas tiu de la funkciado (130 milionoj jare) por dungitaro de 800 homoj en 4 sekcioj:

- La Nacia Muzeo de Moderna Arto.
- La Centro de Industria Kreado.
- La Publika Biblioteko de Informado.
- La Instituto pri Akustika Traserĉado/Muziko.


Aŭdaca estis la planado de la enhavo kun unu spektaklo-salono (600 sidlokoj), du projekcio-salonoj, unu ateliero por infanoj, unu salono de aktualaĵoj (gazetoj, diskoj, ktp...), restoracio, kafeterio, star-drinkejo, vojaĝagentejo, monŝanĝejo.

—oOo—

La Nacia Muzeo de Moderna Arto disponas je 12.190 m² por konstantaj kolektoj, 1.400 m² por eksperimenta galerio de nuntempa arto, 600 m² por kabineto de grafika arto, 1.720 m² por dokumentado kaj 640 m² por burooj, krom 3.600 m² por laŭtempaj ekspozicioj kaj 500 m² da terasoj.

La Publika Biblioteko de Informado enhavas kvar partojn:

- la propre dirita biblioteko estas kun salonoj por kunvenoj kaj ekspozicioj, por mikrofildoj kaj mikroskipoj (15.000 m²);
- la salono de aktualaĵoj kun panoramo de la gazetaro enlanda kaj alilanda, referencejo kaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj pri temo, aŭtoro aŭ aktoro (850 m²);
- la biblioteko de l'infanoj kun referencejo, leg-angulo kaj aŭda-vida sektoro (260 m²);



Nekutima konstruaĵo stariĝis meze de unu el la plej malnovaj kvartaloj de Parizo:


«NACIA CENTRO DE ARTO KAJ KULTURO
GEORGES POMPIDOU»

— kaj la «mediateko» de l'lingvoj, la plej aŭdaca fako kun lernometodoj por 40 lingvoj, kun 40 kajutoj por kaset-magnetofonoj (eĉ kelkaj kun televiziaj aparatoj): el la lingvoj ni citu interalie la aztekan, vaskan, bretonan, korsikan, svahilan, zuluan, ktp... Sed plej interesa por la Esperantofonio estas la ĉeesto de aŭda-vida lernometodo de Esperanto, kiu tiel troviĝas tie laŭ alfabeto vico sur la sama rango kiel la ĉefaj naciaj.

La Centro de Industria Kreado organizas laŭtempajn kaj migrajn ekspoziciojn kaj prezentas unu galerion de aktualaĵoj, alian de retrospektivo, tri salonojn de dokumentado, unu informo-servon pri produktaĵoj, alian pri studoj kaj reserĉoj, kaj trian pri eldonaĵoj.

La Instituto pri Akustika Traserĉado/Muziko estas dividita en kvin fakojn: unu pri instrumentoj kaj voĉoj, alian pri elektro-akustiko, trian pri komputeroj, kvaran t.n. «diagonalan» por kunordigo de la antaŭaj, kaj la lastan pri pedagogia reserĉado; la Instituto loĝas apartan subteran konstruaĵon de 3.000 m² kun interalie unu vasta salono de 500 m², kies volumo, alto kaj akustikaj ecoj povas variu (ekzemple la plafona alteco varias de 14 ĝis 9 metroj).

Jean Thierry



PRI LA TRADUKO DE "Don Quijote de la Mancha"

FERNANDO DE DIEGO

En antaŭaj numeroj de «Horizonto» ni esprimis nian dankan senton al la familio Manteca-Cano kaj al s-ano Victor Ortiz Gratal ĉar pro ilia mecenateco kaj oferemo povis esti superitaj financaj obstakloj ŝajne nesolveblaj por la eldono de *Don Quijote* en Esperanto, kies baldaŭa apero konsistigos sensacion, ne nur en nia verda mondo, sed ankaŭ ekster ĝi.

Fine, sed ne laste, same ricevu plej elkoran dankon la tradukinto de la glora romano, Fernando de Diego, kies plurjara laboro en la transdono de «Don Quijote» brile konfirmas kaj kronas lian tradukan kapablon, cetere, jam pruvitan per liaj Esperantaj versioj de hispanaj kaj hispanamerikaj titoloj, interalie *Cigana Romancaro*, *Kun Sopira Koro*, *La Arbo de la Sciado*, *Doña Bárbara*, *La Lando de Alvargonzález*...

Fernando de Diego naskiĝis en Guadalajara (Hispanio), akiris la venezuelan ŝtatanecon en 1951, profesias kiel tradukisto (ĉefe el la angla) kaj ĵurnalisto, kaj estas membro de la Akademio de Esperanto.

Rilate al sia traduko de *Don Quijote*, li skribas en sia enkonduko al la romano: «Mi plej klopodis fidele reprodukti la ideojn, la atmosferon kaj la stilan ritmon de Cervantes... Al mia versio mi dediĉis la plej belajn jarojn de mia vivo, sed mi estas feliĉa, ke nia internacia lingvo kapablas kaj povas prezenti al la mondo la tutan forton kaj veron de nia glora hidalgo».

Dankon do al nia s-ano Fernando de Diego, kies «Don Quijote» pli levos la prestiĝon de Esperanto inter la kleruloj de la mondo kaj havigos fonton de intelekta plezuro, en senriproĉa, modela lingvo, al ĉiuj esperantistoj.

Inés Gastón

KRONBORG

La foto sur la kovrilpaĝo montras la kastelon Kronborg en Elsinoro, unu el la celoj de la tuttaga ekskurso dum la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La kastelo situas ĉe la plej mallarĝa parto de Sundo, la markolo inter Danlando kaj Svedio. Jam en la 12-a jarcento troviĝis kastelo tie, sed la nunan konstruigis reĝo Frederiko II (1574-85). Ĝi estas unu el la plej interesaj renesancaj konstruaĵoj en Danlando, nun muzeo pri si mem kaj pri ŝiptrafiko.

William Shakespeare famigis Kronborg per sia dramo «Hamleto».

KOMUNIKO DE LA REDAKCIO

Escepte, pro la baldaŭ okazonta 3-a Konferenco de NEM kaj la UK en Reykjavik, tiu ĉi n-ro de «Horizonto» estas pli ol kutime dediĉita al gravaj internaj problemoj de la Esperanto-Movado kaj al ideaj aspektoj de la esperantismo. La redakcio esperas, ke la legantoj ne nur atente studos la publikigitajn materialojn, sed ankaŭ diskonigos ilin per informoj kaj prelegoj en la lokaj societoj, aŭ alimaniere. Tio speciale rilatas al la ĉefartikolo de Prof. Dro. I. Lapenna kaj al la Manifesto 77. Por Paco en Libereco - Por Libereco en Paco.

Red.

ESPLORO KAJ DOCUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna
N-ro 9

8. BEA Reŝanĝis Sian Statuton

En ĉap. 3 de *Hamburgo en Retrospektivo (HeR)* estas detale analizita la partipolitika, nete kontraŭneŭtraleca Programo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA). En 3.1 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 3/76, p. 65) estis menciita la ŝanĝita Statuto de BEA, laŭ kiu unu el la celoj de tiu organizaĵo estas «eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj proleta internaciismo, de alligiteco al tendaro de l'socialismo». El ĵus ricevita nova ekzemplero de tiu Statuto vidigas, ke la ero pri «proleta internaciismo» kaj «alligiteco al tendaro de l'socialismo» estas ellasita en la versio amendita la 12-an de julio 1976, do ĵus antaŭ la UK en Ateno, dum kiu du pliaj instancoj kun partipolitikaj celoj estis akceptitaj kiel «kolektivaj membroj» de UEA (v. en 7.1-7.4 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 6/76, p. 127, kaj n-ro 1/77, p-oj 10-11).

Ne povas esti dubo, ke tiu formala ellaso ŝuldiĝas al la ŝokiĝo, kiun ĉe multaj esperantistoj kaŭzis la nekontesteblaj faktoj malkovritaj en *HeR* kaj la pliaj faktoj prezentitaj en *Horizonto*. Pri tiu malgranda venketo — malgranda, ĉar nur formala — *Horizonto* certe povas esti kontenta, eĉ iom fieri, ĉar ne estas facile devigi gvidantaron de tiaspeca organizaĵo, plene dependa de partipolitikaj fortoj, ellasi el la Statuto «la edukadon de la membraro en la spirito de proleta internaciismo, alligiteco al la tendaro de l'socialismo». Aliflanke, nenio ĝis nun indikas, ke BEA kaj aliaj partipolitikaj organizaĵoj fakte ĉesigis sian partipolitikan agadon en la sino de UEA. Krome, en paragrafo 2 de la amendita Statuto estas aldonita punkto (h), laŭ kiu «BEA estas kolektiva membro de UEA kaj apogas *Mondpacan Esperanto-Movadon*, do nete partipolitikan movadon, kiel pruvite en ĉap. 3.3 de *HeR* kaj plurloke en tiu ĉi rubriko. Tio, cetere, plu restas konforma al la Programo kaj al la partipolitikaj aktivadoj de tiu organizaĵo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 3 kaj 5.4 de *HeR*, kaj ĉap. 18.2.1.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

9. Soveta Jura Periodaĵo pri la Rolo de NRO-j

En n-ro 10/76 de la ĉefa soveta jura periodaĵo *Sovetskoje Gosudarstvo i Pravo* (Soveta Ŝtato kaj Juro), eldonata de la Instituto pri Ŝtato kaj Juro de la Akademio de Sciencoj de USSR, aperis dekpaĝa artikolo sub la titolo «Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) en Kondiĉoj de Malstreĉiĝo», verkita de V. N. Ŭrel. Kvankam nuntempe ekzistas ĉ. 3000 NRO-j, tamen en la artikolo estas pritraktita la rolo nur de la plej gravaj, nome de la organizaĵoj havantaj konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj/aŭ kun Unesko, kiel UEA. En la komenco estas emfazita ilia «kreskanta influo je la monda politiko en la kondiĉoj de malstreĉiĝo» (p. 94). Apartajn laŭdojn ricevis la «amasaj demokrataj NRO-j», inter kiuj elstaras la «tutmonda Pakkonsilantaro» kaj la «Internacia Konsilantaro por Daŭrigo de la Agadoj kaj Ligoj de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj», okazinta en Moskvo en oktobro 1973 (p-oj 95-97). Oni notos, ke la intensigo de la politika komploto en UEA ekde la fino de 1973 plene koincidas kun la «daŭrigo de la agadoj», formulitaj en Moskvo en oktobro 1973. Inter la «demokrataj» kaj «aŭtoritataj» organizaĵoj sur p. 100 estas menciitaj ankaŭ la Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ), kun kiu TEJO, la junulara sekcio de UEA, faris kontrakton pri kunlaboro (v. 4.3 kaj 4.4 de *HeR*). Aliaj «demokrataj» organizaĵoj menciitaj sur la sama loko estas la Internacia Demokrata Federacio de Virinoj, Internacia Asocio de Juristoj-Demokratoj k.s., ĉiam kun la vorto «demokrata» en la titolo kaj ĉiuj plene vivtenataj kaj direktataj de Moskvo.

La kvintesenco de la artikolo estas formulita sur p. 97:

Dum pli frue, en la tempo de «malvarma milito», «multaj NRO-j estis puŝataj en antikomunisman, antisovetan politikon kaj fakte montriĝis en la servo de NATO» /sic!/, nun, dank' al agado de la «amasaj demokrataj organizaĵoj» (menciitaj supre), «pro la malstreĉiĝo /en ligo kun la Konferenco de Helsinki, rim. de la red./ kaj malfortiĝo en la gvidantaroj de multaj NRO-j de la pozicioj de la ĝisostaj predikantoj de antikomunismo /plia sic!/, tiuj organizaĵoj komencas konduki pli liberan politikon rilate al internacia kunlaborado, precipe per establo de kontaktoj kun la universalaj NRO-j, t.e. kun la «amasaj demokrataj organizaĵoj» /ekzemple TEJO kun MFDJ kaj IUS/.

Ciu, kiu ne estas politika analfabeto, bone scias, ke, tradukite el la soveta rusa en kiun ajn lingvon, inkluzive la nesovetan rusan, la cititaj vortoj signifas: dum pli frue la gvidantaroj en la plimulto de vere demokrate organizitaj NRO-j malebligis, ke tiuj organizaĵoj estu misuzataj por kies ajn partipolitikaj celoj, inkluzive la sovetajn («antikomunismo!»), nun, dank' al lerta ekkaperado de la gvidaj pozicioj en tiuj organizaĵoj, ili estas malfermitaj al senbrida partipolitika propagando kaj estas utiligataj por apogadi la sovetan eksterlandan politikon, bazitan sur la *soveta* (eĉ ne «komunista») koncepto de «kunekzistado» kombinita kun tiu de «proleta internaciismo».

Neniu el la ekkaperitaj NRO-j estas eksplicite menciita en la artikolo, sed ĝia enhavo nli ol klare rilatas ankaŭ al UEA kiel unu el NRO-j en konsultaj rilatoj kun Unesko kaj UN. La artikolo ankoraŭfoje — en tiu ĉi kazo per teksto publikigita en la plej grava

soveta jura periodaĵo, do «sur la plej alta nivelo» — konfirmas la koncizan analizon de la vera celo de la partipolitika komploto en UEA, kaj de la metodoj aplikitaj por atingi tiun celon, entenatan en ĉap. 5, precipe en 5.1 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

Aliflanke, en la Antaŭparolo al la verko de Prof. R. Szawłowski *The System of the International Organisation of the Communist Countries* (La Sistemo de Internaciaj Organizaĵoj de la Komunistaj Landoj), publikigita en 1976 en Kanado, estas dirite:

«Tiu ĉi libro rilatas sole al Internaciaj Registaraĵ Organizaĵoj de la komunistaj landoj, kaj ne pritraktas ĉiujn aliajn organizaĵojn kun esence politika naturo, kiuj ne havas oficialan registaran karakteron, kvankam ili estas inspiritaj kaj direktataj de Soveta Unio kaj kvankam ili estas tre gravaj por la propagando kaj disvastigo de la komunistika ideologio sur monda nivelo (ekzemple, la Monda Packonsilantaro, la Monda Federacio de Sindikatoj kaj la Internacia Studenta Unio).» (*Kursivigita de la red.*)

Por kompletigi la tutan bedaŭrindan bildon, estas bone memorigi la forgesemulojn, ke en la julia/aŭgusta numero de *Esperanto*, 1975, do antaŭ la apero de *HeR*, ĝia redaktoro skribis kalumnio, ke «...la kritikantoj de la nuna gvidantaro sub la etikedo de 'neŭtraleco' propagandas la fakte obskuran makartismon kaj revivigas la fantomojn de 'malvarma milito' ...». (Parenteze: oni komparu tiun lingvaĵon de la oficiala organo de UEA kun la supre cititaj vortoj en la ĉefa soveta jura periodaĵo por konstati la esencan identecon). En la sama artikolo li ankaŭ diris: «Estas jam delonge tempo, ke oni ĉesu blufi kaj misgvidi la honestajn neinformitajn homojn». Kaj denove: «Oni ankoraŭ blufas pri ekzisto de 'fidindaj dokumentoj', pri onidira 'komploto'». Kaj li provoke aldonis: «Sur la tablon la atutojn, se oni havas ilin» (ĉio sur p. 183).

Nu, post la publikigo de *HeR*, la multnombraj faktoj publikigitaj en *Horizonto* kaj la supra rekonfirmo de la tuta sovete inspirita ofensivo por kapti la prestiĝajn neregistartajn organizaĵojn, «la atutoj ja estas sur la tablo», kiel kartlude esprimus sin la redaktoro de la organo de UEA, kaj fakte ĉiuj «honestaj neinformitaj personoj» povas juĝi. Mi mem povas nur fidi je la saĝo entenata en malnova diro: oni povas trompi la tutan mondon kelkan tempon, oni povas trompi kelkajn la tutan tempon, sed oni ne povas trompi la tutan mondon la tutan tempon.

Ankoraŭ io: oni ne riproĉu, ke tiu ĉi tuta bedaŭrinda afero en UEA estas traktata politike. Prefere oni komprenu, ke estas maleble prezenti kaj analizi politikan konspiron — nepolitike. Necesas ankoraŭfoje forte emfazi, ke, kompreneble, ĉiu rajtas havi siajn proprajn politikajn konvinkojn, uzi Esperanton ankaŭ por politikaj celoj, eĉ formi partipolitikajn Esperanto-organizaĵojn. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas misuzi partipolitike neŭtralan organizaĵon por partipolitikaj celoj, detrui tiamaniere ĝian neŭtralecon kaj, sekve, universalecon. Nur pri tio temas.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 3 kaj 5.4 de *HeR*, kaj ĉap. 18.2.1.2 kaj 22.3.5.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

10. Plia Malkresko de la Membraro de UEA

Estis nia intenco publikigi en tiu ĉi numero koncizan bilancon pri la ĉefaj rezultoj de la nuna reĝimo en UEA en la trijara periodo ekde julio 1974. Montriĝis, ke tio estas malebla, ĉar la Estrara Raporto, kiu antaŭ Hamburgo ĉiam estis publikigata aparte kaj ĝustatempe, sub la nuna gvidantaro aperos nur en la julia/aŭgusta numero de *Esperanto*, kio, interalie, senigas la MA de unu tuta numero de tiu periodaĵo. Krome, ĝis la fino de majo eĉ la *Jarlibro*, nun publikigata sen la *Dua Parto*, ankoraŭ ne aperis. Tamen, en *Esperanto* n-ro 3/77, p. 58, estas publikigita almenaŭ la statistika trarigardo pri la membraro de UEA en 1976. Tio ebligas precizan komparon kun la jaro 1973, la lasta antaŭ la eventoj en Hamburgo.

En 1973 UEA havis entute 33.716 membrojn, en 1976 la nombro estis 31.668; *neta perdo: 2.048 membroj*, malgraŭ la akcepto de 2 pliaj kontraŭneŭtralecaj «kolektivaj membroj» kaj 1 LA.

En 1973 la Asocio havis 7.302 individuajn membrojn, en 1976 la nombro estis 6.018. *Neta perdo: 1.284 individuaj membroj*, do ĉ. unu kvinono. Tiurilate UEA retroiris je plejaj 22 jaroj: ĝi estas la plej malalta nombro de IM ekde 1954, kiam, *dum sia supreniro*, UEA estis atinginta 6.103 IM, do 85 pli ol en 1976.

En 1973 la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne vicdelegitoj kaj fakdelegitoj) estis 1.294 (*Esperanto* de februaro 1974, p. 39), kio ebligis la elekton de 6 komitatanoj B; en 1976 la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj estis 1.194, kaj la nombro de elekteblaj komitatanoj B estis 5; *neta perdo: precize 100 ĉefdelegitoj kaj delegitoj kaj 1 komitatano B malpli*. Interalie tio signifas, ke nun UEA estas reprezentita per delegitoj en ĉ. 100 lokoj malpli ol en 1973 (ĉirkaŭ, ĉar la nombro de ĉefdelegitoj restis proksimume la sama, tiel ke la malkresko fakte rilatas al la delegitoj). Ne estas surprize, ke la nuna gvidantaro decidis nuligi la rubrikon «Ne plu validas» en la Oficiala Informilo, kiel informas *Esperanto* n-ro 2/77 sur p. 38. Efektive, la listigo de lokoj, en kiuj ne plu estas delegitoj, sendube «okupas tro da spaco». La malaltiĝo de la nombroj de delegitoj ankaŭ signifas, ke en la Komitato de UEA la individua membraro (tra la ĉefdelegitoj kaj delegitoj) estos malpli reprezentita ol antaŭe, kvankam estis necese ebligi pli fortan reprezentigon per amendo de la koncernaj reguloj okaze de la revizio de la Statuto. Pri tio mi atentigis longe antaŭ Hamburgo, interalie en la *Aprila Artikolo* de 1974, dum la

nuna gvidantaro eksplicite promesis ebligi ĝin per la pompe anoncitaj ŝanĝoj de la Statuto. Fakte, post rifuzo de 4 statutsanĝaj projektoj de la koncerna komisiono, oni fine prezentis por aprobo la ekzistantan Statuton sen ŝanĝoj.

Oni komparu tiujn ciferojn kaj faktojn kun la superece-blufa aserto en *Esperanto*, n-ro 11/74, p. 183, ke «la hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 eksigojn» kaj ke «la samaj eventoj rezultigis ankaŭ almenaŭ 5 realigojn».

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 de *Esperanto en Perspektivo*.

Grava agado defende al la homrajtoj

Amnesty International (Amnestia Internacio) estas tutmonda movado, kiu estas tute sendependa de kiuj ajn registaro, politika partio, ideologio aŭ religia kredo. Ĝi laboras por la liberigo de viroj kaj virinoj malliberigitaj kie ajn pro siaj kredo, koloro, etna origino, religio aŭ lingvo, kondiĉe ke ili ne uzis aŭ rekomendis perforton. Ilin oni nomas «prokonsciencaj malliberuloj».

Amnesty International kontraŭbatalas torturon kaj mortpunon en ĉiuj okazoj kaj sen rezervo. Ĝi insistas pri honestaj kaj baldaŭaj procesoj por ĉiuj prokonsciencaj malliberuloj.

Amnesty International penas por tutmonda observado de la Universala Deklaro de la Rajtoj de l'Homo kaj de la Normaj Minimumaj Reguloj por la Traktado de Malliberuloj. Ambaŭ dokumentojn formulis Unuiĝintaj Nacioj.

La Jaro de la prokonsciencaj malliberuloj

Oni deklaris 1977 la Jaro de la prokonsciencaj malliberuloj. En kunordigita kampanjo la grupoj kaj membroj de Amnesty International ĉi-jare klopodas intensigi la publikajn konscion kaj maltrankvilon pri malobservadoj de homrajtoj, kie ajn ili okazas, kaj doni pli grandan subtenon al prokonsciencaj malliberuloj en la tuta mondo. Specialajn kontribuojn nun faras elstaraj personoj en la mondo de filmo, muziko, literaturo kaj bildigaj artoj. Ĉiulande oni kolektas subskribojn por peticio kies teksto troviĝas ĉi-sube.

Dum la Jaro de la prokonsciencaj malliberuloj Amnesty International kunmetas listojn da malliberuloj kiuj estas kazoj de adoptado aŭ ekzamenado en la sekvaj kategorioj. Tiuj ĉi listoj entenas ne ĉiujn malliberulojn en la koncerna kategorio:

La sindikatano, ĵurnalisto/verkisto, parlamentano/politikisto, medicina personalo, studento/docento, universitatano.

Plie Amnesty publikigos broŝurojn pri diversaj temoj, ekz. pri la advokato, kampano, eklezio, virino, medicina profesio, junularmovado ktp.

Peticio por la liberigo de prokonsciencaj malliberuloj

Dum 1977, la Jaro de la prokonsciencaj malliberuloj, subtenantoj de Amnesty International cirkuligas ĉi-suban peticion. Ni volus proponi al vi akiri subskribojn de kolegoj kaj amikoj, por kio ni anticipe dankas vin. La teksto de la peticio, tradukita ĉangle, estas jena:

Ni, subskribintoj,
kun profunda INDIGNO ĉar multparte en la mondo viroj kaj virinoj, kiuj nek uzis nek rekomendis perforton, estas malliberigitaj nur pro sia politika aŭ religia kredo, siaj raso, koloro aŭ lingvo;

ĉi tio malgraŭ la multaj humanaj kaj noblaj deklaroj de la unuiĝintaj nacioj de la mondo, el kiuj la Universala Deklaro de la Rajtoj de l'Homo estis la unua antaŭ tri jardekoj.

INSTIGAS la Generalan Asembleon de Unuiĝintaj Nacioj senprokraste fari konkretajn paŝojn por certigi striktan observadon de la Universala Deklaro de la Rajtoj de l'Homo

kaj instigas ĉiun registaron senescepte en la mondo agadi por tuja liberigo de ĉiuj prokonsciencaj malliberuloj.

Nomo :
Adreso : } preslitere (Multobligota laŭbezono)
Subskribo:

Mi, F. Munniksma, volus proponi al vi laŭenhave precize retraduki ĉi tiun tekston de la peticio en unu el la lingvoj angla, franca, germana kaj hispana kaj uzi tiun retradukitan tekston por plenumo kaj subskribado. Poste vi aldonu la ĉi-supran tekston en Esperanto kaj sendu la tuton al: Amnesty International, Promotion Department, PO Box 1341, Luxembourg, kie oni kunordigas ĉi tiujn aktivecojn. Varman antaŭdankon!

Kompilis: F. Munniksma (Nederlando)

XVII

La karaj manoj, ekse miaj,
Kaj tute fajnaj, tute belaj,
Post la misfaroj vivmuelaj
Kaj ĉiuj aventuroj fiaj,

Post la havenoj, ankrolevoj,
Kaj post la landoj kaj provincoj,
Pli reĝaj ol dum temp' de princoj,
Ĉi manoj peras al mi revojn.

Manoj de song' sur mia koro,
Vi kion degnis — ĉu komplikaj? —
El tiuj klaĉoj plej malicaĵaj
Aldiri al ĉi kor-angoro?

Ĉu falsas do l' vizio ĉasta,
Tutplena de samsent' spirita,
De komprenem' patrin-imita,
De streĉa korovarmo vasta?

Rimorso kara, kaj tre bona,
Benataj revoj, manoj piaj,
Ho adorataj manoj ŝiaj,
De vi deflugu gest' pardona.

el la franca, Roger Bernard

EL LA BRETO DE MODERNAJ POLAJ POETOJ KAJ VERKISTOJ

Jan Strzadala /nask. 1945/ loĝas konstante en Gliwice - Pollando, sed kun Vroclavo li estas ligita i.a. pro sia aparteno al la Estraro de la Rondo de Junaj Verkistoj. Li debutis en la jaro 1969 sub pseŭdonimo Jan Strehl per poetika kajero s.t. «Przebrany semestr»/«Malgajnit semestro». Nun li laboras super la psikologia romano kaj pretigas la volumon de poeziaĵoj por eldono. Ĉi-sube ni prezentas unu el la lirikaĵoj de la poeto.

/laŭ la revuo «Wiadomości»/«Novaĵoj» 45/76/
prilaboris kaj esperantigis:
Jan Smykalski

Jan Strzadala

REVENIS EL NIGRO

Malfermiĝis frumatene
En suburbo
Tomboj plengajaj kaj freŝaj
Kaj levigis el ili poetoj
Kovrante pli hontindajn partojn
Per blanka ĉifonita verso
Ili staris surprizitaj momenton
Ke neniu ilin salutas
Poste ili disiris
Ĉiu la vizaĝon en sia maniero
Per belforma metaforo
Dekadavris deaĝis
Kaj tuj novtempigis
Ĉiu deskuis mortajn mitojn
Krataton de l' ideo ligis ĉirkaŭ la kolo
En feblajn pulmojn ĉiu aeron enspiris
Kaj ekkriis
Nuntempaj poetoj
Nenio estas tie
Ĉi koridoro de l' morto
Per la tombo komenciĝas
Sed neniam ĝi finiĝas
Malplena ĝi estas
Silenta
Kaj propra por ĉiu
La poezion serĉu kontraŭe.

Oni ne permesis
Krii mortintojn
Neniu el ili protestis
Ĉiuj fermitaj en nigraj ŝkatoloj

Senfende traplektitaj per morto
Eĉ nun ili ŝajnis
Ke ili nenion aŭdas
Por ne porti en malproksiman vojaĝon
Demandojn
Al kiuj ili ne trovis respondon
Dum la vivo.

El la pola tradukis:
Jan Smykalski

EL LA JIDA RELIGIA POEZIO

de Rabi Levi — Jichak el Berdičev

I

VI — DIRA KANTO

(A Dudele)

Ho Mastro de l' mondo, ho Mastro de l' mondo,
Vi — diran kanton mi kantos al Vi.
«Aje emcaëña ve-aje lo emcaëña?»
Kie mi povas Vin trovi,
Kie mi povas Vin eviti?
Kien ajn mi iras, jen Vi!
Kie ajn mi staras, jen Vi!
Ja Vi, nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi.
Se bone — ja pro Vi;
Se, ho ve! malbone, ankaŭ pro Vi.
Vi, ja Vi, estis — Vi, estas — Vi, estos — Vi.
Reĝis, reĝas, reĝos.
Ciele — Vi, tere — Vi.
Supre — Vi, sube — Vi.
Kien ajn mi min turnas,
Kien min direktas — Vi!

II

KADIS

(Proceso kun Dio)

Bonan matenon, Mastro de l' mondo!
Mi, Levi — Jichak ben Sara, el Berdičev,
Venis al Vi kun juĝ-afero
Nome de Via Izrael.
Kion Vi havas kontraŭ Izrael?
Kaj kial Vi ĝenas Vian popolon Izrael?
Ĉiukaze: «Ordonu al la Izraelidoj!»
Ĉiukaze: «Parolu al la Izraelidoj!»
Ĉiukaze: «Diru al la Izraelidoj!»
Paĉjo! Tiom da gentoj ekzistas:
Babelanoj, Persoj, Edomidoj...
Kion do diras la Germanoj?
«Nia reĝo estas reĝo!»
Kion do la Angloj diras?
«Nia estro estas estro!»
Kaj mi, Levi — Jichak ben Sara, el Berdičev, diras:
«Gloraj kaj sankta la nomo de Dio!»
Kaj mi, Levi — Jichak ben Sara, el Berdičev, diras:
Mi ne moviĝos for, mi ĉiloke staros,
Ke ĉesu la suferoj, ke ili tuj finiĝu!
«Gloraj kaj sankta la nomo de Dio!...»

El la jida — tradukis: N. Z. Maimon
reviziis: G. Waringhien

POSTPAROLO

1

Jida lingvo, simpla lingvo
De la paĉjoj — panjoj —
Vi ja estas tia ĉarma
Kiel la florar' Julia.

Jida lingvo, kora lingvo
De mil — milaj fratoj —
Levi — Jichak en vi kreis
Kantojn de l' animo pia.

Kaj Reb Naĥman al ni jide
La fabelojn donis —
Jida lingvo, panja lingvo,
Ĝoj' de vivo nia!

(Eliezer Schindler)

Tiu ĉarma poemeto, gloriganta la jidan lingvon, aperis en legolibro, verkita por religiaj knabinaj lernejoj de Polujo («Bet Jaakov») en la 20-aj jaroj. Ĝi citas du elstarajn crojn de la jida literaturo, kiun la Ĥasidismo⁽¹⁾ al ĝi atribuis. Fakte ili apartenas al la

unuaj verkoj de tiu literaturo ĉar aliaj apenaŭ ekzistis. Longan tempon ili restis interne de la ĥasidisma medio, nekonataj al la ekstera mondo. Nur en nia tempo ili famiĝis kaj populariĝis. Nun ankaŭ sekularuloj alte taksas ilian valoron kaj admiras tiun religian sintenon, kiu fluas senpere el la abundo de la koro.

Hodiaŭ ni prezentas nur la poemojn de Rabi Levi — Jichak. La fabeloj de Rabi Naĥman — 13 fantazi-riĉaj, pensigaj pecoj — estas pli ampleksaj. Ili aperos poste.

2

La supraj *du poemoj* apartenas al la plej ŝatataj eroj de la moderna jida deklamarto. La aŭtoro — kaj komponanto de la melodio — estis unu el la ĉefaj ĥasidaj majstroj: Rabi Levi — Jichak el Berdiĉev (1740-1809). Li ne intencis verki poemojn kaj niaj literaturaj konceptoj estis fremdaj al li. Sed kiu povas nei, ke la versoj, de li aranĝitaj, estas ĉarmaj, belsonaj, kaj havas poezian aromon? Laŭ la maniero, kiel li eldiris siajn pensojn, kiel li esprimis la sentojn, kiel li ordigis la vortojn — li estis poeto. Ili fluis el lia profunda religia sinteno, enradikiĝinta en lia koro. Ĉe la unua poemo estis la Diamo, kiu inspiris lin; ĉe la dua — la amo al la samgentanoj, kompato pri iliaj afliktoj. Sen rimoj, sed ne sen ritmo interna, ili distingigas per aparta beleco, veraj perloj de la poezia arto.

Nur du poemojn li kreis, malgraŭ tio li meritas la honoran titolon de poeto. Ĉar ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito. Kaj estas fakto, jam longe konstatita: vere bonkvalitaj poemoj — eĉ de elstaraj poetoj, kiuj multe verkadas — restas malmultnombraj. Jen la kaŭzo, kial ni rigardas tiun ĥasidisman eminentulon granda poeto, malgraŭ la limigita nombro de liaj poemoj — ili havas daŭran valoron. Kaj ni ne forgesu: li estis pioniro; jida poezio ankoraŭ ne ekzistis.

3

La *unua poemo* baziĝas sur komune-homaj sentoj kaj tial ĝi tuŝas ĉies koron, tute gale al kiu nacio oni apartenas kaj al kiu religio oni sin alkalkulas. Legante ĝin ni tuj sentas la poezian ĉarmon, la superan belecon, esprimatajn en tiuj malmultaj linioj, kiuj kulminas en la ĉiam ripetata «Vi». La ideo, bone ellaborita, troviĝas jam en la Biblio (Psalmaro 139, 7-10):

Kien mi iros for de Via spirito?
Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo?
Se mi leviĝos al la ĉielo, Vi estas tie;
Se mi kuŝiĝos en ŝed, jen Vi tie estas.

Cu mi okupos la flugilojn de la matenruĝo,
Cu mi loĝiĝos sur la rando de la maro;
Ankaŭ tie Via mano min kondukos,
Kaj Via dekstra mano min tenos.

Ankaŭ la *dua poemo* elvokas altan gradon de admiro, pro ĝia beleco kaj pro la rezonado en la disputo kun Dio. Ĝi elkreskis el travivaĵoj de la juda nacio; baziĝas sur pensoj, kiuj turmentas ĉiun anon de tiu popolo. La vortoj direktitaj al Dio, ŝajnas akraj, sed ili fontas el koro vundita de afliktoj. Nejudoj verŝajne ne kaptos la esencon de la poemo. Pro tio ni klarigos iom de ĝia fono.

Tio okazis en la «Tago de Pekliberigo» (Jom Kipur). En tiu tago — tiel oni supozas — Dio sidas sur trono de juĝo, por decidi pri la sorto de ĉiu homo dum la venonta jaro. Rabi Levi — Jichak gvidas sian komunumon en preĝado. Alveninte al la dua parto de la liturgio, kiun antaŭiras la solena «Kadis» — preĝo⁽²⁾, li uzas tiun okazon por prezenti sian juĝaferon. Estante forta defendanto de la juda popolo kaj fama pro sia kompatemo, li ne povis akcepti la ideon, ke tiu popolo daŭre pekadas. Do, starante antaŭ la majesto de la Eternulo, anstataŭ humile atendi la verdikton, li ribelas kaj prezentas ultimaton: ke ĉio ĉesigu la afliktojn, la suferojn tuj kaj senprokraste.

Je alia okazo li alparolis Dion jenmaniere:

«Memoru! Je Sinajo Vi iradis kun Via Torao kiel komercisto, kiu ne sukcesas vendi siajn putrintajn pomojn, Viajn preskribojn Vi proponis al ĉiuj gentoj, kiuj deturnis sin kun malŝato. Izrael sola deklaris sin preta akcepti ilin, akcepti Vin. Kie estas ĝia rekompenco?»

4

Kiel oni komprenu tiajn eldirojn el la buŝo de profunde religia viro? Cu ili ne estas arogantaj, blasfemaj?

Elie Wiesel, fama verkisto en lingvoj franca kaj angla, mem edukita en la ĥasidisma medio, pritraktas tiun problemon en sia libro: «Souls en Fire» (angle: Animoj en fajro). Li komentas (p. 109):

Dum aliaj mistikuloj flegis kun Dio la «Mi-kaj-Vi» rilaton, Levi — Jichak minacis, ke li ĉesigos tiun rilaton. Per tio li intencis montri, ke oni povas esti judo kun Dio, en Dio, eĉ kontraŭ Dio, sed ne sen Dio.

Kaj plue (p. 111):

Malgraŭ tiaj publikaj elpaŝoj, neniuj iam akuzis lin pri blasfemado. Pro du kialoj. Unue: Levi — Jichak ne faris tion senfine. Post kiam li aŭdigis siajn internajn pensojn, li returnis al Dio. Post kiam li esprimis la riproĉojn kaj eldiris la minacojn, li reiris

— libere, kiel libera homo — al la antikva majesta litanio: Kadiŝ. Due: La juda tradicio permesas diri al Dio ĉion, kion oni volas, kondiĉe, ke ĝi estu por protekti la homon. Tio ankaŭ dependas, kie la ribelanto elektas stari: interne de la komunumo, li rajtas diri ion ajn; tamen se li iras eksteren, li ne havos tiun rajton.

5

Jam en la *Biblio* ni trovas dubojn pri la Dia justeco. Vere *Moseo* konstatis, ke «ĉiuj Liaj vojoj estas justaj» (Readmono 32,4), sed *Abraham*, multajn jarojn antaŭe, estis skeptika kaj demandis (Genezo 18,25):

Cu la juĝanto de la tuta tero ne agu juste?

Simile *Jeremia*, multajn jarojn poste (12,1):

Mi parolos kun Vi pri justeco:

Kial la vojo de la malpiulo estas sukcesa

Kaj ĉiuj perfiduloj vivas trankvile?

Kaj *Habakuk* (1,13):

Kial Vi rigardas malhonestulojn,

Kaj silentas kiam malpiulo engiutas

homon pli virtan ol li?

Ankaŭ *Iob* ne kaŝis siajn internajn dubojn. Pli ekscitita ol *Abraham*, ol *Jeremia* kaj *Habakuk*, li ekkriis (21, 6-9):

Kiam mi ekpensas pri tio, min atakas teruro,

Kaj tremo kaptas mian korpon.

Kial malpiuloj vivas,

Atingas maljunecon, akiras grandan havaĵon?

Ilia idaro estas bone aranĝita antaŭ ili, kun ili,

Kaj ilia devenantaro estas antaŭ iliaj okuloj.

Iliaj domoj estas en paco, sen timo;

Kaj la vergo de Dio ne estas sur ili.

Eĉ la pia, fidanta *psalmisto* krias en sia malespero (*Psalmaro* 44, 23-24):

Kial Vi dormas, mia Sinjoro?...

Kial Vi kaŝas Vian vizaĝon,

Forgesas nian mizeron kaj nian suferon?

Kaj kion ni diru pri la *Talmudo*? Pri du bibliaj versoj —

• *Psalmaro* 89,8 : Kiu estas potenca kiel Vi, ho Eternulo?

• *Eliro* 15,11: Kiu estas kiel Vi inter la dioj?

Komentas la *Talmudo* (*Gitin*, p. 56 b):

Aba Hanan diras: «Kiu estas potenca kiel Vi, ho Eternulo?» —

kiu estas kiel Vi potenca kaj malmola, ĉar Vi aŭskultas insultojn kaj blasfemojn de tiu malpiulo [*Tito*, kiu detruis la templon] kaj Vi silentas.

Disĉiplo de *Rabi Iŝmael* prelegis: «Kiu estas kiel Vi inter la dioj» elim — kiu estas kiel Vi inter la mutuloj? [ilmin].

Alia ekzemplo: Tri bibliaj versoj priskribas la Diajn atributojn —

• *Readmono* 10,17: Dio granda, potenca kaj timinda.

• *Jeremia* 32,18: Dio granda, potenca.

• *Daniel* 9,4 : Dio granda kaj timinda.

Pri tiuj variantoj komentis la *Talmudo* (*Joma*, p. 69 b):

Moseo diris: «Dio granda, potenca kaj timinda». Venis *Jeremia* kaj diris: La nejudoj frakasas la templon, kie estas Liaj timindaĵoj? Pro tio li ne diris en sia preĝo: timinda. Poste venis *Daniel* kaj diris: La nejudoj subigas Liajn filojn, kie estas Lia potenco? Pro tio li ne diris [en sia preĝo]: potenca... Kiel povis tiuj saĝuloj [*Jeremia*, *Daniel*] fari tion kaj kripligi formulon, kiun *Moseo* formulis? Respondis *Rabi Elazar*: Sciante, ke Dio estas verema, ili ne volis diri al Li ion malveran.

6

Jen do kelke da citaĵoj el du fundamentaj verkoj de la juda religio. Ili montras, ke *Rabi Levi* — *Jichak* iris laŭ vojo ebenigita de piaj antaŭuloj. Sed nove, originale estas: li ne nur miris kaj demandis «*Kial*», ne nur rezigne konstatis la silenton de Dio, sed riproĉis, minacis kaj prezentis ultimaton.

En nia generacio — post la neimageblaj teruraĵoj de la nazioj — elkreskas la figuro de *Rabi Levi* — *Jichak* kiel lumturo en la vasta maro: liaj kuraĝaj vortoj, plenaj de kolero pri la afliktoj de la juda popolo, alprenas nun neordinaran, aktualan signifon.

N. Z. Maimon

(1) «*Ĥasidismo*» estas mistika popola movado, kiu emfazas optimismon kaj ĝojon en la vivo. Ĥasidismo meze de la 18-a jc. inter la judoj de orienta Eŭropo kaj ekkaptis la koron de milionoj. Ĥasidismaj komunumoj ekzistas nun en Usono kaj Israelo.

(2) «*Kadiŝ*» (= sankta) estas malnova preĝo, kiu proklamas la majeston de Dio kaj enhavas peton, ke la Dia regno baldaŭ venu (simile a «*Patro Nia*» de kristanoj). Ĝi estas en la aramea lingvo kaj komenciĝas: «*Glorata kaj sanktigata estu Lia granda nomo*». (Konate ankaŭ kiel funebra preĝo, kvankam nek la morto, nek la mortinto estas menciitaj.)

MAGDA SZABO, nuntempa hungara verkistino, naskiĝis en 1917 en la urbo Debrecen. Ŝi frekventis la mezlernejon kaj universitaton tie kaj doktoriĝis en 1940.

Sia kariero kiel aŭtoro komenciĝis en la 40-aj jaroj, kiam ŝi kontribuis poemojn al beletraj revuoj. En 1940 aperis ŝia unua publikigita volumo, studaĵo pri la romiepoka kosmetiko. Post longa silentado ŝi reaktivis en la literatura vivo en 1958.

Sia poezio, montranta certecon kaj majstrecon de formo, estas intelekta kaj kontemplema. Pro sia moderna mesaĝo kaj literaturaj kvalitoj, ŝi fariĝis unu el la plej popularaj hungaraj verkistoj, kaj ŝiaj romanoj jam estas tradukitaj en plurajn lingvojn.

En 1968 aperis en la revuo Hungara Vivo ŝia novelo *La Rolo* (A Szerep), kiun Lajos Tárkony tradukis en Esperanton. Ĝi troviĝas en la novel-kolekto *Alvók Futása* (Kurado de Dormantoj, 1967), el kiu venas ankaŭ la novelo tradukita tie ĉi, kies originala titolo estas Csé.


P-LITERO

de Magda Szabo

Ekde la tempo, kiam ŝi laboris en la lernejo, la lernejestro ankoraŭ neniam tiel parolis al ŝi. Kiam finfine li ellasis ŝin de la oficejo, ŝi tuj elpaŝis sur la terason situantan antaŭ la stabĉambro. Ŝi etendis sur la kornicon la litografitajn foliojn de la *Instrukcioj*, por ke tiel aspektu de interne, ke ŝi legas, ke ŝi ne eltenas atendi, ĝis ŝi povas hejmeniri, sed tuj deziras scii, kiamaniere necesas modifi la instruplanon en aprilo de 1945. La larmoj de kolero vualis ŝiajn olulojn, do eĉ se ŝi volus, ŝi ne vidus la literojn.

Ŝi neniam amis Katrinjon kaj nun sentis, ke ŝi tutsimple malamas ŝin. La trian fojon oni venigis ŝin pro ŝi, la trian fojon oni atentigis ŝin, ke ŝi ne bone plenumas sian laboron. La lernejestro pasie amis la beletrajn surmurajn bildtabulojn, la lertajn malgrandajn tabelojn faritajn per plurkoloraj inkoj kaj la demonstraĵojn de desegnaĵetojn. Kaj li neniam povis akcepti ian skriblecionon kiel eminentan, se ĝia ekstera formo ne estis senripoĉa. Ankaŭ nun li kredas, ke la vivo dependas de la misformaj p-literoj de Katrinjo. «Ne diru tion, bonvolu, ke vi preparis vin por esti mezlerneja instruistino kaj vi ne konas la oficialajn formojn de la literoj. Lerne la skribadon de la aboco. Multe pli gravajn aferojn ol tio vi ja povis alproprigi ĉe la universitato. Po. Tiel mi faras la pon, tiel mi rondigas ĝin, tiel mi ligas ĝin al la sekva litero. Vere, vi ne povas diri, ke tio estas sorĉaĵo.»

Sorĉaĵo tio ne estas, tute ne. Nur simple ŝi ne volas tion fari, tio ne interesas ŝin. Ŝi iros al la centrejo kaj sciigos ilin, ke ŝi ne plu restos en tiu ĉi elementa lernejo, ke ĉirkaŭ p-literoj turniĝas la mondo, kie oni festas la tagon de birdoj kaj arboj kaj balbutas idiotajn poemetojn, kiuj diras, kie la mondo estas belega. Ne tion ŝi entreprenis, kiam ŝi komencis siajn studojn. Komuniki sciojn al inteli-



gentaj, iom grandaj geknaboj, tion ŝi emus fari. Sed penadi pri la p-literoj de Katrinjo — ne. Jam unu fojon ŝi iris al la centrejo kaj tiam oni persvadis ŝin, ke ŝi ja restu. Venontfoje ŝi ne lasos sin forskui per ĉiaspecaj trankviligaj argumentoj: tie ĉi ŝi vere estas bezonata, la etato de la instruistoj en la loka gimnazio estas kompleta, tie ĉi, male, mankas multaj virkolegoj kaj lamas la instruado; estas tiuj, kiuj ne troviĝis post la militkaptiteco. Ŝi restu, ĉar oni ne povas doni al ŝi alian postenon.

Multaj vir-kolegoj mankas. Ĉu al ŝi oni diras tion?

Ŝi staris kun fermitaj okuloj kaj turnis sian vizaĝon al la printempa vento. Cetero, la lernejestro ĵus diris, ke li ja volis paroli kun ŝi denove. Por ili estas malagrabla, ĉar tiel ŝajnas en ĉiuj ŝiaj malvolontaj vortoj kaj moviĝoj, ke ne plaĉas al ŝi esti inter ili. Kial tio ne plaĉas al

ŝi? Ili ja ne estas malbonaj homoj. Ŝi nur staris antaŭ li, silentis kaj gapadis al la desegnaĵoj de la tapiŝo. Kion ŝi devus respondi? Ĉu tion, ke ankaŭ ŝi scias, ke ili ne estas malbonaj homoj, sed s-ino Kovács havas du belajn infanojn kaj ŝia edzo estas hejme. Manjo Takács estas fianĉino, kiun edzinigos la gimnastika instruisto, kiu kaŝe atendadis en la farmbieno de sia avino dum la lastaj monatoj, kaj estas hejme la edzo ankaŭ de s-ino Szilágyi. «Kial ne edzinigas tiel bela knabino?» — demandis antaŭ nelonge s-ino Kovács, la vic-lernejestrino. Ŝi same respondis al ŝi kiel al la lernejestro. Ĉu ŝi parolu kun ili eble pri Aleksandro? Ĉu ŝi kriu tra la lerneja megafono, kiel li pereis ĉe la fronto, kiamaniere li malaperis el inter la vivantoj, kiel la fumo el la kamentubo? Kiu povas paroli pri tio?

La p-literoj de Katrinjo — ĉirkaŭ tiuj turniĝas la mondo. «Tiel mi faras la pon, tiel mi rondigas ĝin, tiel mi ligas ĝin al la sekva litero, jen tiel. Tiel la kolemino montru tion ankaŭ al Katrinjo kaj igu ŝin skribi sur la nigra tabulo vortojn kun la p-litero, por ke ŝi lernu ĝin definitive. Serĉu tiajn konceptojn, kiuj interesas la infanon. Retenu ŝin tie ĉi jam hodiaŭ, post la instruado. Lenjo Simon kaj Katrinjo loĝas en la sama domo. Sendu letereton kun ŝi, por ke la patrino ne maltrankviliĝu, por ke ŝi sciu, kie restas ŝia filino. Kaj bone praktiku duonhoretan.»

La problemoj de la lernejestro!

Tuj la sonorilo anoncos la finon de ŝia libera horo. Kiel utile ŝi pasigis ĝin! Ne, sekvontjare ŝi ne plu faros tion, kaj se la centrejo ne helpas, ŝi mem prenos la aferon en siajn manojn. Ŝi iros al la legomvendejo specigi brasikojn. Tio estos pli interesa tasko ol la p-literoj de Katrinjo. Kiam oni vendas rapojn, almenaŭ ne estas necese tridek fojojn tage klarigi al svarmo da infanoj, ke la justeco ĉiam venkas kaj la vivo estas belega.

Dum la paŭzo ŝi skribis la letereton al la patrino de Katrinjo, suprenkuris al la unua etaĝo kaj parolis kun la infano Simon kaj ankaŭ kun Katrinjo. Katrinjo nur rigardis al ŝi per siaj senmovaj tute malfermitaj grizaj okuloj. «Stulta — pensis la instruistino. — Indiferenta. Mi abomenas okupiĝi pri ŝi. Kiel sensenca estas ĉio, kiel superflua.» Ŝi havis ankoraŭ unu lecionon en la knaba klaso. Ŝi eniris inter la knabojn, kvazaŭ martiro. Ŝi instruis la gramatikon tiun tagon kaj ŝi sciis, ke ŝi faras tion malbone kaj daŭre sentis la enuon kaj la kontraŭstaron de la klaso. Unufojon la lernejestro enrigardis. La knaboj eksaltis, kiam ili ekvidis lin en la aperturo de la pordo, kaj ĉies okuloj komencis rideti, kvankam la lernejestro eĉ ne parolis kaj nur rigardis ilin. «Ili amas lin — pensis la instruistino — Min ili ne amas. Mi ne restos tie ĉi. La lernejo ne interesas min. Mi havas nenion. Ankaŭ miaj gepatroj jam ne vivas, eĉ parencojn mi havas nenie. Mi havas nenion, kiu scius, kion mi perdis, kiu pen-

sus pri la samo, pri kio mi pensas. Mi devas vivi inter fremduloj.

Se ne estus la turpaj p-literoj de Katrinjo, je la dekdua ŝi povus hejmeniri. Nun ŝi devis atendi, ĝis finos ankaŭ la infano. La virinoj, kiuj havis liberan horon, konversaciis tie ĉirkaŭ ŝi, interŝanĝis manĝaj-receptojn kaj instruis unu la alian pri tio, kion oni povas fari el maizfaruno. Ŝi elprenis sian laborkajeron kaj komencis kolekti la vortojn komenciĝantajn per p-litero.

S-ino Kovács, la vic-lernejestrino, klinis sin super ŝin. S-ino Kovács ĉiam sciis ĉion, kio okazas en la lernejo. Ankaŭ nun ŝi demandis nur tiom: «Katrinjo?» Kiel la lernejestro, ankaŭ ŝi skribis kiel modelon grandegan p-literon kaj konsilis, ke ŝi tuj igu la infanon ankaŭ difini la skribitan vorton; tiel samtempe ŝi povas plenumi ankaŭ la ekzercon de evoluigo de vortprovizo.

«Porkido» — skribis la instruistino kaj ŝi miris pri sia propra amareco. Ja kiel povas akordi tiom da senespereco kun tia ludema koncepto, pri kio Katrinjo nature ridetos. «Pavo, persiko, papilio, poneo.» La lernejestro povos ĝoji, ĉar ŝi trovis nur tiajn vortojn, kiuj apartenas al la koncept-sfero de la infano, kiuj elvokas agrablan asociadon. «Pudingo. Pigo. Pilko.»

Sia larmo falis, kaj ŝi forviŝis ĝin. «Vi malvarmumis» — bedaŭris s-ino Kovács kaj proponis al ŝi aspirinon. Ŝi kapskue diris, ke ŝi ne deziras ĝin. Ŝi daŭrigis la ekzercon pri la p-litero, kolektante la vortojn. Ŝi trovis la vorton princo kaj parenco kaj tiun ĉi: petolo. En lernejo la petolado estas ĉiama. Tie ĉi ĉiam, malantaŭ ĉiu pordo, oni moviĝadas, parolaĉas kaj ade aŭdiĝas la paŭz-sonorilo. Paŭzo, ankaŭ tiu ĉi estas p-litera vorto. Ŝi skribis ĝin en sia kajero.

Katrinjo atendis sur la unua benko. Ŝi vokis ŝin al la nigra tabulo kaj montris al ŝi tion, pri kio la lernejestro kaj s-ino Kovács instruis. Ŝi desegnis turpan p-literon, kaj ŝia mano tremis. Katrinjo obeeme kopiadis la misformajn strekojn. Ankaŭ nun ne aperis sur ŝia vizaĝo emocio. «La mondo estas via, Katrinjo, — pensis la instruistino —, tie ĉi mi restas pro vi dum la tagmanĝa horo kaj ni ludadas. Pavo, poplo, parado.»

— Porkido! — ŝi diktis. — Pigra porkido.

Nun ŝi subridaĉos — ŝi atendis tion. Sed la infano restis serioza, preskaŭ malbonhumora. Poneo. Pigo. Plago. Neniu gajeco estis sur la atentema vizaĝo. Nur la malbelaj literoj plimultiĝis sur la nigra tabulo. La infano laboris kun plena indiferenteco. Pudingo. Katrinjo skribis ĝin: pudino.

— Pudingo! — diris la instruistino per pli alta voĉo. G estas antaŭ la O. Kion vi rigardas? Ĉu vi ne scias, kio estas pudingo?

Ŝi ne atendis respondon al la demando,

kion ŝi faris, samkiel kelkfoje oni demandas iun infanon: «Ĉu vi ne povas paroli?» aŭ «Ĉu do vi estas muta?» Sed Katrinjo respondis. Ŝi diris, ke ŝi ne scias, kio estas pudingo.

Ili ekrigardis unu la alian. Inter la memoraroj de la instruistino ruliĝis sangruĝaj orangoj, flavruĝ-okulaj daktiloj, ĉerizoj kaj sekvinberoj kun rumo, ĉokolado. Inter la memoraroj de Katrinjo estas nenio. La malbelaj p-literoj tie blankis sur la nigra tabulo. La infano aldonis g-literon al la vorto pudino. La instruistino trapensis la tekston: porkido, poneo, pigo, plaĝo, kaj subite fariĝis klare al ŝi, ke en la regiono tute ne estas riverbordo, kaj jam de longe oni forportis ĉiujn poneojn dum la milito, kaj ne eblas promeni en la arbaro observi birdojn, ĉar tie inter la arboj ankoraŭ estas la min-barajo. Ili rigardis unu la alian. La okulharoj de Katrinjo ne vibris.

— Skribu el via kapo p-literajn vortojn — diris la instruistino. Ĉu vi povas?

Katrinjo diris, ke ŝi povas.

— Kaj se mi demandas, kion io signifas, ĉu vi povas diri al mi ties signifon?

Katrinjo jese balancis la kapon kaj komencis skribi. Ŝi jam skribis multe pli belajn literojn ol la instruistino, preskaŭ tiel elegantajn kiel la lernejestro. Ŝi skribis: pistolo.

— Kial ne pavo — demandis ŝin la ins-

truistino. — Kial ne persiko, papilio, pluvo? Kial pistolo. Dio mia? Kial?

— Kiun portas la soldatoj — la infano difinis la vorton laŭte, kun klara artikulado, kaj ŝi ĝustigis la s-literon, por ke ĝi estu pli ronda. Poste, apud ĝi ŝi skribis: pulvo.

«Ne! — diris la penso de la instruistino. — Katrinjo, estu indulga! Ne klarigu ĝin!»

— Pulvo, diris Katrinjo artikulaciante —, kiu mortigas la soldatojn. Palto. Ili portas ĝin. Pafo.

Ŝi haltis, ĉar rompiĝis sur la nigra tabulo la pinto de la kreto, kiun ŝi malbone tenis pro sia ega penado. «Aleksandro — diris la penso de la instruistino — Aleksandro! La pistolo, kiun vi portis, la palto, kiu kovris vian korpon, la pulvo, kiu estis en la obuso, kiu mortigis vin. Pafo.»

— Paco. — diris Katrinjo enpensigante. Ŝi skribis ĝin kaj haltis, ĉar tiun vorton ŝi ne povis iel klarigi. La instruistino ekrigardis ŝin. La unuan fojon en sia vivo ŝi rigardis ŝin tiel vere, por ke ŝi ankaŭ vidu ŝin. La unuan fojon post la morto de Aleksandro ŝi sentis, ke ŝi tamen havas rilaton al iu en la mondo kaj ŝi sentis ankaŭ, ke ŝi eble ankoraŭ ne foriros de la lernejo.

Tradukita el la hungara lingvo de
Eva kaj Bernard Golden

ESPERANTO KAJ LA NACIAJ LINGVOJ

Dum jarcentoj, eble eĉ jarmiloj, la nura solvo por interkompreniĝi kun alilingvanoj estis lerni iliajn lingvojn. La kleraj Romianoj lernis la grekan kaj fieris pri sia kono. Ofte oni trovas greklingvajn citaĵojn en la tekstoj de latinaj aŭtoroj. (Tio pravas, ke snobeco ne estas propraĵo de nia epoko!) Poste, en la mezepoko, la latino estis uzata en ĉiuj universitatoj de Eŭropo. Ĝi tiam servis kiel internacia lingvo, sed nur ĉe la kleruloj, kaj tiu latino tre malsimilis al la klasika latino parolata en la antikva Romo kaj principe instruata en niaj nuntempaj gimnazioj. Ĝi estis simpligita kaj multe pli facila ol tiu de Cezaro aŭ Cicerono. Tamen ne parolis ĝin la popolo, kiu tiam eĉ ne scipovis legi aŭ skribi sian gepatran lingvon! Sed tiu mezepoka latino, kvankam uzata de multaj homoj, havis certan influon sur la vortaron de la eŭropaj lingvoj (ankaŭ germanaj kaj slavaj), kiuj tiam alprenis multajn vortojn kun latinidaj radikoj. Ĝi kontribuis al la formado de la t.n. «internacia vortaro», pri kiu mi reparolos. Ŝajnas, ke en la mezepoko, oni preskaŭ neniam lernis fremdajn naciajn lingvojn. La intereso pri ili komencis vekigi en la epoko de la Renesanco, eble pro la deziro legi originale la verkojn de la grandaj italaj aŭtoroj. En Francujo, en la 17-a jarcento, la klasikaj aŭtoroj, ĉefe Corneille kaj Molière, scipovis la italan kaj la hispanan, ĉar ili ofte ĉerpis sian inspiron en la sudeŭropaj literaturoj. Sed estis nur izolaj kazoj: la plej multaj homoj tute nesciis la lingvojn de la najbaraj popoloj. Dum la 19-a jarcento, la nobelaj kaj riĉaj familioj dungis alilandajn guvernistinojn, kiuj parolis nur sian lingvon al la infanoj. Dank'al tiu bonega sistemo, iliaj gefiloj fariĝis dulingvaj ekde sia junaĝo, sed bedaŭrinde tio estis nur privilegio de la nobelaro kaj riĉularo.

Fine kreiĝis linceoj kaj gimnazioj, en kiuj oni instruis interalie fremdajn lingvojn, apud la latino. Sed eĉ tiam, ne ĉiuj ricevis tiun instruadon. Kaj la metodoj tiam uzataj ne estis efikaj.

Kiam aperis Esperanto, multaj asertis: «Nun, ni ne plu bezonas lerni fremdajn lingvojn!». Kaj eĉ Zamenhof parolis pri tempoŝparo. Tio estas ja vidpunkto, kaj la homoj, kiuj pro neceso devis lerni fremdajn lingvojn por havi kontaktojn kun alilandanoj aŭ legi iliajn librojn, povas ĝoji, ke esperanto evitas al ili, certgrade, lernadon, kiun ili rigardas kiel servuton. Sed ne por ĉiuj la lernado de fremdaj lingvoj estas teda aŭ malagrabla; kaj aliflanke la scipovo de naciaj lingvoj povas esti tre utila, eĉ por esperantistoj. Dum vojaĝo kaj restado en fremda lando, oni rilatas ne nur kun samideanoj, kaj tiam la kono eĉ elementa de la nacia lingvo de la lando, kie oni troviĝas, povas esti tre utila kaj eviti malagrablaĵojn! Oni malprave agas forjetante la lernadon de naciaj lingvoj pro tio, ke oni scipovas esperanton.

Ambaŭ konoj estas utilaj!

Sed iuj eble objektos, ke la lernado de naciaj lingvoj estas longa kaj malfacila. Mi certe ne kontraŭdiros, ĉar estante mem instruisto pri germana kaj hispana lingvoj, mi konscias la problemon kaj mi bone scias, ke esperanto estas multoble pli facila ol iu ajn alia lingvo!

Sed esperanto povas helpi nin en la lernado de naciaj lingvoj kaj mi firme asertas, ke la tempo dediĉita al ĝia studado estas tempo gajnita en la studado de aliaj lingvoj. Mi provos klarigi al vi kial.

Ni supozu, ke du homoj volas lerni fremdan lingvon, kaj ke unu el ili scipovas esperanton kaj la alia ne scipovas ĝin. Estas — ekzemple — du francoj, samaĝaj kaj samekleraj, kiuj eklernas samtempe la anglan lingvon. Por atingi la saman nivelon, la neesperantisto bezonos mil horojn da studado, dum por la esperantisto sufiĉos sepcent aŭ cent kvindek horoj. Se mi konjektas, ke ĉi tiu bezonis cent horojn por lerni esperanton, tiam la tempogajno, kompare kun la neesperantisto, estos cent kvindek aŭ ducent horoj. Tiu, kiu lernis unue esperanton kaj nur poste la anglan, atingas la celon pli frue ol tiu, kiu lernis nur la anglan. Kaj la unua havas plie la avantaĝon scipovi ne nur unu, sed du lingvojn: la anglan kaj esperanton.

Ni do ne plu lasu la nesciantojn diri: «Lerni esperanton, estas perdi sian tempon!». Nur tiuj, kiuj ne esploris la demandon, povas aserti tian sensencaĵon!

Kompreneble mia ekzemplo estas nur supozita, sed simila eksperimento okazis en brita lernejo inter du klasoj de infanoj lernantaj la francan. En unu klaso, ili lernis la francan dum tri jaroj; en la alia, ili lernis unue esperanton dum unu jaro kaj poste la francan dum nur du jaroj. Kaj fine de la tria jaro evidentiĝis, ke la rezultoj en la dua klaso superis tiujn de la unua, kvankam ĝiaj infanoj lernis la francan dum nur du jaroj.

Ni esploru nun, kial esperanto alportas tian helpon.

La vortprovizo de esperanto konsistas plejparte el la t.n. «internacia vortaro». Se en nia propra lingvo iu «internacia» radiko ne ekzistas, ni lernas ĝin per esperanto. Tiel ekzemple germano lernos per esperanto la internacian radikon *flor'*, kiu ne ekzistas en lia lingvo; kaj same hispano aŭ italo lernos la radikon *onkl'*, kiun li ne konas nacilingve; franco lernos la radikon *strat'*, kiun li retrovos pli malpli en la germana (Strasse), la angla (street), la nederlanda (straat) kaj eĉ en la itala (strada).

Plie, francoj, hispanoj kaj italoj konscios dank'al esperanto, ke *tempo* kaj *vetero* estas du malsamaj aferoj, dum en iliaj respektivaj lingvoj ambaŭ nocioj esprimiĝas per unu sola vorto (temps, tiempo, tempo), kaj kiam ili lernos ekzemple la anglan aŭ la germanan, ili kapablos distingi inter *time* kaj *weather* aŭ *Zeit* kaj *Wetter*.

Same angloj kaj francoj lernos diferencigi *demandi* de *peti*, kiuj estas la sama vorto angle (to ask) kaj france (demander), dum aliaj lingvoj tradukas, kiel en esperanto, per du malsamaj vortoj: germane (fragen/bitten); hispane (preguntar/pedir).

Oni ofte asertas, ke la lernado de latino tre utilas al tiuj, kiuj parolas latinidan lingvon kaj helpas ilin pli bone scipovi la propran gepatran lingvon. Tiu aserto estas sendube prava, sed kiom da horoj necesas por scipovi la lingvon de Cicerono? Mi estas certa, ke esperanto havas la saman utilon tiurilate, kaj ke per ĝi la celo estas konsiderinde pli rapide atingita. Jen unu ekzemplo de la utilo de latindevena vorto en esperanto por franco: En la franca estas neniuj etimologia rilato inter la substantivo *faute* kaj la koncerna adjektivo *coupable*. Sed franco, kiu lernas la vorton *kulpo*, klare vidas la rilaton inter ĝia adjektivo *kulpa* kaj ties traduko *coupable*. Kaj tio same utilas al alilandano lernanta la francan, se li scipovas esperanton!

Iu lernonta la germanan, kiu unue lernas esperanton, trovos en la zamenhofa la sistemon de la kunmetitaj vortoj, kaj li pli facile asimilos tiun vortfaradon tute similan en la lingvo de Goethe. Tiel *dormoĉambro* preparos *Schlafzimmer* kaj *skribotablo* *Schreibtisch*. Kaj same por la verboj kunmetitaj kun iri: *foriri*, *eliri* kaj *preteriri*: ili helpos kompreni kaj memori: *fortgehen*, *ausgehen* kaj *vorbegehen*.

Kaj ĝenerale tiuj, kiuj parolas latinidan lingvon, lernos dank'al esperanto la ĝermanajn radikojn — kaj tiuj, kiuj parolas ĝermanan lingvon, lernos la latinidajn radikojn, kiujn iliaj lingvoj ne posedas.

Jen do la utilo de la lernado de esperanto por pli facile asimili la vortaron de la naciaj lingvoj. Ĝi estas nedubebla; tamen mi opinias, ke por la gramatiko, la kono de esperanto estas ankoraŭ pli utila.

La gramatiko de esperanto estas tre logika, multe pli logika ol iu ajn gramatiko de la naciaj lingvoj, kaj ĉefe: *ĝi ne havas esceptojn*. La tre simpla, nur dukaza deklinacio de esperanto estas por tiuj, kies gepatra lingvo ne posedas deklinacion, la unua paŝo al la lernado de pli komplikaj deklinacioj, kiel la kvarkaza de la germana aŭ la seskaza de la rusa aŭ de latino. Dank'al esperanto, la lernanto facile alkitimigis al diversaj formoj de iu vorto laŭ ĝia funkcio en la frazo. En esperanto, tiu deklinacio estas plej simpla kaj baziĝas sur la ĉeesto aŭ foresto de la litero «n», same por pronomoj kiel por substantivoj aŭ adjektivoj. Mi supozas, ke en neniuj alia lingvoj ekzistas tiel facila deklinacia sistemo, tiel facile lernebla: ĝi do povas esti la ŝlosilo de la deklinacio por multaj homoj, por kiuj ĝi estas nur malviva litero.

Por ne eliri el tiu problemo, la regulo pri la akuzativo de direkto (la 13-a regulo de la fundamenta gramatiko) ebligas pli facilan lernadon de la sama regulo en ĉiuj lingvoj havantaj deklinacion. Tio tre helpas min kiel instruiston pri germana lingvo, ĉar miaj lernantoj facile memoras la paralelajn regulojn en ambaŭ lingvoj, kaj la instruisto pri latino miras, ke ili tiel rapide lernas la saman regulon en la lingvo de Cicerono!

La logikeco de esperanto pensigas ilin logike, kaj tio sen iu ajn dubo helpas ilin en la lernado de fremdaj naciaj lingvoj. Ni ĉiuj havas en niaj naciaj lingvoj amason da nelogikaĵoj, la t.n. idiotismoj, kiuj ĝenas nin, kiam ni lernas aliajn lingvojn, kaj ankaŭ kiam ni devas traduki el la gepatra al alia lingvo. Ekzemple la franca esprimo *être en train de* estas tre nelogika kaj ĝia traduko al alia lingvo estas malfacila. Sed kiam lernanto scias, ke *il est en train de lire* estas en esperanto *li estas leganta*, li plej nature komprenos kaj uzos en la angla la formon *he is reading* aŭ en la hispana *esta leyendo*, kiuj ekzakte respondas al la esperanta tre logika formo, kiun li estas unue lerninta.

Kelkaj lingvoj (kiel la franca kaj la hispana) esprimas la komparativon superecan kaj la superlativon per la sama vorto (en la franca: *plus*, en la hispana: *más*) kaj nur ĉeesto aŭ foresto de la artikolo diferencigas ambaŭ formojn. En tiuj lingvoj, ne estas klare, ke la formo (france: *la plus forte des deux mains* — hispane: *la más fuerte de las dos manos*) estas komparativo: pro la ĉeesto de la artikolo, ĝi konfuziĝas kun la superlativo. Tial franco aŭ hispano ne konanta esperanton riskas erare traduki al la angla, germana aŭ latina per superlativo. Tio ne okazos, se li unue lernis esperanton, ĉar li scios, ke oni devas diri tiuokaze: *la pli forta el ambaŭ manoj*, kaj en ĉi tiu esperanta frazo la komparativo klare aperas, kaj tio estas taŭga modelo por aliaj lingvoj, kie la komparativo necesas, kiam estas la *pli* el nur *du*!

La franca vorto *que* estas vera insido por niaj francaj lernantoj kaj ili ofte eraras tradukante ĝin al fremdaj lingvoj. Ĝi povas esti:

subjunkcio: *Savez-vous que?* Ĉu vi scias, ke?

konjunkcio: *plus grand que* pli granda ol

rilativo: *l'homme que tu connais* la viro, kiun vi konas

adverbo: *aussi haut que la maison* tiel alta kiel la domo

kaj tiel plu...

La kutimo esprimi tiujn frazojn en esperanto ebligas distingon inter tiuj formoj ĉar ili malsimilas en la lingvo internacia. Kaj tiu utila distingo kondukas la lernanton al korektaj formoj en la lernataj lingvoj kaj ofte eĉ en la propra gepatra lingvo. Ekzemple en la germana, li trovos senpene la ĝustan tradukon de ĉiu «*que*» de la franca, ĉiujfoje kun la taŭga formo, nome: *Wissen Sie, dass? größer als der Mann, den du kennst so hoch wie das Haus.*

Iu, kiu lernas la anglan lingvon post esperanto, konstatos la similecon de ambaŭ gramatikoj: la unikan difinan artikolon kaj ĉefe la fakton, ke la gramatika genro respondas al la sekso: *he* kaj *she* en la angla, kiel *li* kaj *ŝi* en esperanto, kaj *it* por bestoj kaj objektoj, kiel *ĝi* en esperanto. Li ankaŭ kutimiĝos dank'al esperanto al poseda adiktivo, kiu dependas de la genro de la posedanto (kaj tio helpas ankaŭ al tiu, kiu lernas la germanan, la rusan aŭ alian lingvon kun simila sistemo).

Ankaŭ al tiu, kiuj lernas la rusan, la antaŭa scipovo de esperanto povas helpi, kompreneble ne tiom vortare, kiom gramatike. Ekzemple: anstataŭigi la adjektivon per la adverba formo (en -e) kiel en la esprimo *estas malvarme* apud: *la vetero estas malvarma*, tio ekzistas ankaŭ ruslingve. Mankas la kirilaj literoj por doni aliajn ekzemplojn. Por la lernado de latino, la diferenco inter *sia* kaj *lia*, *ŝia*, *ĝia*, *ilia* helpas diferencigi inter *suus*, *sua*, *suum* kaj *ejus*.

Ni do vidas, ke ankaŭ per sia simpla kaj logika gramatiko, esperanto estas valora helpilo al tiu, kiu lernas aliajn lingvojn. Sed estas ankoraŭ io alia, kion mi nomos *psikologia faktoro* kaj kio estas, laŭ mia opinio, ankoraŭ pli grava ol la vortaro kaj gramatiko. Individuo estas kvazaŭ katenita al sia gepatra lingvo, precipe se li parolas nur unu lingvon. Por la unulingvulo, ĉiu penso estas nedisigeble ligita al vorto. Tio estas grava malavantaĝo, kiam li devas lerni alian lingvon, ĉar tiam li nepre devas pensi unue en la gepatra kaj traduki el la gepatra al la lernita lingvo.

Mi konis profesoron, kiu diris al siaj studentoj: «*Ne kredu, ke vi posedas lingvon; estas la lingvo, kiu posedas vin!*». Frazo sprita, sed ankaŭ prava, ĉar la gepatra lingvo estas por ĉiu el ni vera tirano, kiu regas nian tutan menson. Kaj ĝia tiraneco estas tiom pli granda, ke ĝi estas sola. La homoj, kiuj ekde sia junaĝo parolas du lingvojn (ekzemple regionan kaj nacian lingvojn) havas tiurilate grandan avantaĝon kaj la fremdlingva lernado estas multe pli facila por ili. Sed ne ĉiuj havas tiun ŝancon. Kaj por la plimulto de la homoj, kiuj estas unulingvaj, esperanto ebligas al ili eliri el sia gepatra lingvo, kio faciligas la lernadon de aliaj lingvoj. Iuj objektoj: «*Sed iu ajn alia lingvo povus ludi la saman rolon. Kial do lerni esperanton, kaj ne la anglan, aŭ la italan, aŭ la hispanan?*». La respondo estas simpla: Kiel jam dirite, esperanto estas multe pli facila, do multe pli rapide lernita. Do la «*eliro*» el la gepatra lingvo estos pli rapida lernante es-

peranton ol alian lingvon, eĉ apartenantan al la sama familio. Ekzemple, mi asertas formale, ke franco lernos pli facile kaj pli rapide esperanton ol la italan, kaj ke germano lernos pli facile kaj pli rapide esperanton ol la nederlandan. Por ĉiuj en la tuta das al pluraj faktoroj: unue al la oportuna elekto de la plej internaciaj radikoj, due al la simpleco de la gramatiko, kiu enhavas neniun escepton. Dank'al la internacia vortaro, ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj jam komprenas parton de la vortoj de Esperanto sen antaŭa lernado. Necesas tamen konfesi, ke tiu facileco de la vortaro dependas, por ĉiu, de la gepatra lingvo, kaj estas klare, ke finno (ekzemple) ne tiel facile lernos la vortaron de esperanto, kiel italo. Sed estas ankaŭ aliaj elementoj, kiuj povas helpi la personojn parolantajn nelatinidan lingvon. Ekzemple, germano retrovos en esperanto la kunmetitajn vortojn de sia lingvo; kroato retrovos la fonetikon de la sia; polo retrovos en esperanto la saman regulan akcenton —ĉiam sur la antaŭlasta silabo— kiun posedas la pola lingvo. Koncerne la senesceptan gramatikon, ne necesas emfazi, ke tio estas ekskluziva avantaĝo de la lingvo de Zamenhof, kiu nepre faciligas ĝian lernadon por ĉiuj. Cetere, mi ofte faris la demandon: «Ĉu esperanto estas facila por vi?» al homoj parolantaj la plej diversajn lingvojn kiel gepatran; kaj ĉiuj respondis al mi egale: «Jes, tre facila!». Esperanto estas do sen ia dubo la plej facila lingvo por ĉiuj homoj. Kompreneble, estas tre malfacile kaj eĉ neeble *mezuri* la facilecon de esperanto kompare kun la naciaj lingvoj. Tamen, mia sperto lingvoinstruista kondukis min al la konstato, ke —por atingi la saman nivelon— franca lernanto bezonas dekoble malpli da tempo en la lernado de esperanto, ol en tiu de la germana lingvo. Konkrete, la rezulton atingitan post 400 stud-horoj por la germana, li atingos post nur 40 horoj lernante Esperanton. Kun miaj propraj lernantoj en la gimnazio, mi uzas dek procentojn de la tempo instruante al ili esperanton naŭdek procentojn instruante la germanan, kaj fine de la jaro, ili scipovas tiom da esperanto, kiom da germana lingvo. Sekve de tio mi konkludas, ke oni devus ĉiam instrui esperanton, ĉu antaŭ, ĉu paralele kun alia nacia lingvo. La rolo de nia internacia lingvo estus tiam tiu de la solfeĝo por tiuj, kiuj lernas ludi muzikinstrumenton. Ĝi estus kvazaŭ piedbreto, kiu faciligus kaj mallongigus la lernadon de aliaj lingvoj. Mi opinias, ke estas malprava sinteno diri: «Mi estas poligloto, do esperanto ne interesas min!». Same kiel estas malsaĝe aserti: «Mi tute ne bezonas lerni fremdajn lingvojn, esperanto ja sufiĉas al mi!». Estas klare, ke esperantisto nepre estas pli bona poligloto, kaj reciproke tiu, kiu scipovas aliajn naciajn lingvojn, havas pli bonan stilon en esperanto ol tiu, kiu konas nur (krom esperanto) sian gepatran, ĉar esperantisto scipovanta nur sian gepatran lingvon ne povas eviti la influon de sia propra lingvo en esperanto.

Ekzemple, li pli facile uzos en la internacia lingvo parolturnojn el sia gepatra. Male, tiu, kiu scipovas aliajn naciajn lingvojn ol sian gepatran, havos pli vastan paletron, el kiu li elektos la plej delikatajn nuancojn, kiuj plibeligos lian stilon. Unu el niaj plej grandaj tradukistoj volonte konfesas, ke li uzas tradukojn alilingvajn por traduki pli ĝuste el la gepatra al esperanto kaj liaj tradukoj estas nesupereblaj. La genio de Raymond Schwartz kredeble devenas de la fakto, ke li perfekte posedis, kiel lorenano, du naciajn lingvojn. Zamenhof estis poligloto, kaj ankaŭ Grabowski kaj Kalocsay scipovis multajn lingvojn. Certe tial ili estis la plej grandaj esperantistoj!

Kompreneble «pri gustoj oni disputi ne devas», kaj se iuj ŝatas lerni fremdajn lingvojn, aliajn malŝatas tion.

Esperanto paradokse utilas al ambaŭ kategorioj:

— Al tiuj, kiuj ne emas lerni lingvojn aŭ preferas dediĉi sian tempon al aliaj aferoj, esperanto ebligas per minimuma studo kontaktojn kun iliaj tutmondaj homfratoj.

— Al tiuj, kiuj volas ekkoni fremdajn kulturojn, legi originalajn verkojn, kontakti kun ĉiuj homoj dum siaj vojaĝoj, kaj tiucele bezonas lerni naciajn lingvojn, esperanto ebligas pli rapidan kaj pli agrablan lernadon.

Konklude, ĉiu povas laŭ sia plaĉo elekti inter ambaŭ formuloj:

Esperanto *anstataŭ* fremdaj lingvoj.

Aŭ: Esperanto *kaj* fremdaj lingvoj.

Ĉiuj homoj: tiuj, kiuj elektas la unuan, kiel tiuj, kiuj elektas la duan formulon, povas nur danki al Zamenhof pro lia genia eltrovaĵo: **ESPERANTO!**

Daniel LUEZ

Se vi intencas veturi al la 62-a UK kaj deziras objekte informi pri la nuna stato de la Esperanto-Movado, vi povos antaŭ tio partopreni la laboron de la 3-a Internacia Konferenco de NEM. Detaloj sur la lasta kovrilpaĝo.

MANIFESTO 77

de la Esperanto-Movado

POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

En la aldonaj notoj al la Manifesto estis dirite, ke bedaŭrinde, pro la amplekso de la antaŭvidita laboro, ne estos eble konfirmadi la ricevon de la unuopaj apogoj, nek korespondadi en ligo kun la Manifesto. Je pluraj demandoj pri diversaj aspektoj de tiu ĉi iniciato, plej oportune estas doni jenan publikan respondon:

1. *Diskonigo interne de la Esperanto-Movado.* — La teksto de la Manifesto estis sendita komence de 1977 al la redakcioj de preskaŭ ĉiuj Esperanto-periodaĵoj, inter ili *Esperanto* de UEA, kaj al ĉiuj Esperanto-fakoj de radio-stacioj kun la peto publikigi resp. disaŭdigi ĝin. Ĝis la fino de majo nur *Horizonto* publikigis la kompletan tekston (n-ro 2/77), dum kelkaj aliaj gazetoj kaj almenaŭ tri radio-stacioj menciis la iniciaton. La Manifesto estis sendita ankaŭ al la Estraro de UEA, al la Plenuma Komitato de SAT, al ĉiuj internaciaj fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj, en aprilo/majo, al la landaj asocioj, komitatanoj de UEA kaj ĉ. 1000 aliaj personoj. Fine, ĝi estis komunikita al la Organiza Komitato de la 3-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj al la LKK de la 62-a UK kun propono prezenti ĝin por akcepto al la Konferenco, resp. al la UK. Sekve, la iniciatinto kaj liaj helpantoj faris la maksimumon por diskonigi la Manifeston interne de la Esperanto-Movado kaj tiel doni la eblecon al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopaj Esperanto-parolantoj apogi ĝin. Pri la fakto, ke tamen tre multaj ankoraŭ restas komplete neinformitaj, respondecas tiuj, kiuj ĝis nun prisilentis la tutan aferon.

2. *Ĝisnunaj apogoj.* — Malgraŭ la «oficiala» prisilento, la nombro de la ĝisnunaj apogoj estas tre kontentiga kaj pliaj apogoj alvenas ĉiutage el ĉiuj partoj de la mondo, ofte kun ege interesaj, kuraĝigaj aŭ eĉ kortuŝaj komentoj. Ekzemple, simpla manlaboristo skribis, ke li «ne komprenas altan politikon», sed li ja «deziras pacon en libereco», kaj tial apogas. Alia, el orienteŭropa lando, komentis: «Mi subskribis, kvankam mi ne kredas, ke sen uzo de perforto estas eble ŝanĝi kion ajn en mia lando». Konata esperantisto el sudamerika lando aldonis: «Senrezerve mi aprobas kaj subskribas... kaj gratulas pro la trafcela iniciato...». Estus utile iam prezenti, eble post la finiĝo de tiu ĉi agado, sciencan analizon de la komentoj kiel mikrodokumenton pri la reagoj de humanece orientitaj personoj je tiu ĉi brulanta demando de nia epoko.

Inter la subskribintoj troviĝas personoj de ĉiuj aĝoj, de diversaj okupoj kaj profesioj. Multaj estas funkciuloj en Esperanto-organizaĵoj. Inter ili troviĝas ankaŭ konsiderinda nombro da delegitoj de UEA. Ĉar la Manifesto 77 estas malfermita por kunsubskribo ĝis la fino de 1977, kaj multaj pliaj apogoj estas atendataj, kompleta listo de ĉiuj unuopuloj kaj organizaĵoj povos esti publikigita nur en januaro 1978. Intertempe, por ioma orientiĝo de la legantoj, jen la nomoj de nur kelkaj el la multaj personoj, kiuj kunsubskribis la Manifeston ĝis la fino de majo 1977:

D-ro A. Albault, kuracisto; A. S. Almeida, peranto de UEA en Portugalio; Prof. D-ro S. Anagnostakis, univ. profesoro; C. Angas, oficistino; W. Atkinson, sekretario de la Londono Esperanto-Klubo; S. Baily, juristo-solicitoro; F. Ballaven, fervoja oficistino; J. Bandres, advokato; D-ro J. Bielsa Vispe, dentkuracisto; Ake Blomberg, redaktoro de la sveda *La Espero*; Doktorino M. Boulton, verkistino anglalingva kaj Esperanta; D-ro M. A. Camarero, advokato; Erik Carlén, industria direktoro, antaŭe prezidanto de KELI, antaŭe vicprezidanto de UEA; J. Casamian, laboristo; Ing. E. Cebrian, inĝeniero; B. Clavier, D de UEA; Mag. Anna kaj Mag. Isai Dratwer; R. Eichholz, direktoro de la Terminologia Centro de la sekcio Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto, komisiito de UEA pri la Magnetofona Servo; W. Eichholz; D-ro R. England, universitata esploristo pri matematiko; O. Eklund, sekr. de la Esp. societo en Helsingborg; D-ro G. Fatas, universitata docento; T. Fraser, eksredaktoro de *Esperanto en Skotlando*; M. de Freitas, komizo; Dr-ino L. Gabrielli, verkistino; P. Gaborit, skulptisto; S. Gacond, instruisto kaj radio-kronikisto; Erik Gadd, emerita juĝisto; D-ro J. A. Garces, advokato; D-ro E. Gastón, advokato; Inés Gastón, redaktoro de *Horizonto* kaj sekretariino de «Fundación Esperanto»; Emil Gehring, vicdelegito de UEA; J. Giladi, sekretario de Esperanto-Ligo Israela kaj komitatano de UEA; E. Grillo, sociologo-juristo; J. Grundkötter, antaŭe kasisto kaj poste trezoristo de la Germana Esperanto-Asocio; Dipl. ing. R. Haferkorn; D-ro A. Halbedl, em. advokato; L. Hernandez, studentino; G. Hofstätter, pensiulo, VD kaj FD de UEA; H. W. Holmes, emerita ŝtatoficisto, Honora Prezidanto de UEA 1964-1974; N. Holmes, honora vicprezidantino de la Londona Esperanto-Klubo, D de UEA; Dipl. Wim Jansen, projektingeniero de ESTEC de la Eŭropa Spacaŭtoritato, komitatano de UEA; W. Kaukal, pensiulo; J. M. Lagunas, ĵurnalisto; W. Laederach, de Elsinora Esperanto-Societo; J. L. Lasala, pentristo; C. Lauridsen, studento; J. Lenkas, pastro; F. V. Mathias, Dumviva Membro, D kaj FD de UEA; L. Miguel, advokato; Dr-ino Carolina Minnaja, iama profesoro en duagrada lernejoj; D-ro Nicola Minnaja; J. Mraz,

em. lerneja direktoro; F. Munniksma, ekstradukisto en farmacia industrio, aŭtoro de la «Internacia Komercia-Ekonomika Vortaro en 9 Lingvoj»; F. Nicolas, industriisto; M. Nicolas, instruistino; R. Oliete, juĝisto de supera tribunalo; D-ro K. Perko, ŝtatoficisto, fervojisto, D de UEA; Cand. oec. H. V. Rasmussen, ekonomikisto, prezidanto de la Ortio, em. instruisto; Prof. J. Régulo Pérez, universitata profesoro pri la hispana lingvo, antaŭe profesoro pri romanida lingvistiko; F. W. Rentmeister, komitatano kaj ĉefdelegito de UEA; D-ro V. Rubio, kuracisto; K. Ruff, lerneja direktorino; C. Sanchez, laboristo; Prof. D-ro M. Sancho-Izquierdo, d-ro hc. de la universitatoj de Montpellier kaj Bourdeaux, prezidanto de Esperanto-Societo de Zaragoza, hon. prez. de Hispana Esperanto-Federacio, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA; P. Serrano, ĵurnaleja direktoro, prezidanto de ILEI; D-ro C. Stefanov, dentisto; J. Thierry, kunredaktoro de *Horizonto*; D-ro J. L. Tortel, kuracisto; Lis Thune, instruistino, prez. de Dana Sekcio de ILEI; D-ro J. I. Villellas, advokato; D-ro Alfred Wenger, kuracisto; P. Zacho, ĉefinstruisto; C. Zapata, laboristo; D-ro R. Zeballos-Morales, kuracisto; Ing. Hans Zeller, kemiisto.

Ĝis la sama dato la sekvantaj organizaĵoj apogis la Manifeston:

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj; Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio; Esperanto-Asocio de Danaj Instruistoj; Esperanto-Centro «Rheinland-Pfalz»; Esperanto-Societo «Unueco», Graz; Eŭropa Klubo, Landa Ligo Rejnlando-Palatino; Hispana Turisma Esperanto-Sekcio; Esperanto-Societo «La Espero», Kopenhago. Organiza Komitato de la 3-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

3. *Pliaj subtenoj.* — Ĉiu apoganto povas facile kontribui al la agado per diskonigo de la Manifesto al siaj geamikoj kaj per propono al sia loka, landa aŭ faka organizaĵo apogi ĝin. La samon oni povas proponi al diversaj internaciaj kaj landaj Esperanto-kongresoj, konferencoj kaj alispecaj renkontiĝoj. Ju pli da apogoj, des pli forte esprimiĝos la Esperanto-Movado en tiu ĉi jaro 1977, decide grava por la monda paco kaj libereco, kaj tial ankaŭ por la Internacia Lingvo. Estu ankoraŭfoje dirite, ke ĉiu persono, kiu laŭ kiu ajn maniero sciiĝos pri la Manifesto kaj deziras ĝin apogi, povas tion fari per simpla p. karto aŭ per aparta slipo en koverto, adresita al la iniciatinto (77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF).

La Manifesto 77 estas ne nur plene konforma al eksplicita regulo de la Statuto de UEA (art. 4), menciita en la Manifesto mem, sed ankaŭ, pli vaste, al la esencaj celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado ekde Zamenhof ĝis niaj tagoj. Nenio, do, malhelpas, ke la baldaŭ okazontaj kongresoj kaj konferencoj de NEM, SAT, UEA k.a., apogu ĝin. Tiudirektajn proponojn rajtas fari ne nur la organizaj komitatoj de tiuj kunvenoj, sed ankaŭ ĉiu ajn kongresano, resp. komitatano, aŭ grupo da ili kolektive.

En la kazo de UEA tiun proponon certe rajtas fari ĉiu ajn membro, kaj espereble ĝin faros almenaŭ tiuj komitatanoj, ĉefdelegitoj, delegitoj kaj aliaj funkciuloj, honoraj, dumvivaj kaj aliaj IM, kiuj mem aprobas kaj subskribis la Manifeston. La apogo de UEA kaj/aŭ de la UK en Reykjavik al la Manifesto estus, interalie, tre utila por UEA mem, ĉar per tiu apogo ĝi almenaŭ formale montrus, ke ĝi intencas reveni al la tradicia linio de humaneca internaciismo, kiu inspiris la Asocion, precipe ĝiajn plej agemajn aktivulojn, ekde la fondiĝo en 1908 ĝis la bedaŭrindaj eventoj de la mezo de 1974. Tio, krome, sendube kontribuos al la reakiro en la publika opinio de tiu prestiĝo, kiun UEA ĝuis kiel sendependa organizaĵo, fidela al sia propra Statuto kaj ne troviganta sub la influo aŭ eĉ sub la premo de kiu ajn fremda ideologio. En noteto, publikigita sur p. 96 de *Esperanto* n-ro 5/1977, eĉ la redakcio rekonas, ke en la Manifesto «oni elstarigas la gravecon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en la maniero kiel tio estas koncize notita ankaŭ en la Statuto de UEA». Se tiel — kaj tiel ja estas — UEA povus kaj devus kunsuskribi la Manifeston kaj komenci retrovadi sin mem.

4. *Diskonigo ekster la Esperanto-Movado.* — En januaro 1978, post la finiĝo de la tuta agado, la Manifesto 77, kun la nomoj (aŭ pseŭdonimoj laŭ la deziroj de la apogintoj el landoj sen demokrataj liberecoj) de ĉiuj individuaj kaj kolektivaj subskribintoj, estos komunikita al Amnestio Internacia, al la Sekretariatoj de UN kaj Unesko, la Komisiono pri la Homaj Rajtoj de UN, al ĉiuj organizaĵoj, komitatoj aŭ elstaraj unuopuloj luktantaj por la realigo ĉie en la mondo de la jure rekonitaj homaj rajtoj. En konvena momento, nepre post julio 1977, la Manifesto estos sendita ankaŭ al la Beograda Konferenco, kies laboroj komenciĝos meze de junio kaj finiĝos verŝajne en decembro 1977, kaj kiu ekzamenos la atingojn aŭ foreston de atingoj el vidpunkto de la promesoj kaj rekomendoj entenataj en la Fina Akto de Helsinki. Paralele, al la Manifesto estos donita vasta publikeco pere de la nacilingva gazetaro kaj aliaj rimedoj de komunikado. Se iu internacia Esperanto-Kongreso, konferenco aŭ alispeca renkontiĝo subtenos la Manifeston, certe la prezidantaro de la koncerna kunveno prizorgos, ke la teksto (en perfekta nacilingva traduko) aperu en la nacilingva gazetaro. Ĉio ĉi donos apogon al la potenca moviĝo de la monda publika opinio por la homaj rajtoj kaj ebligos al la Esperanto-Movado klare reesprimi siajn tradiciajn celojn kaj idealojn de interpopola kompreniĝo, kiuj povas plene realiĝi nur en kondiĉoj de paco en libereco kaj libereco en paco.

I. L.

MALFERMITA LETERO AL LA ESTRARO DE UEA

Ateno 9.5.1977

Estimataj sinjoroj,

Estrarano de Helena Esperanto-Asocio sciigis al mi okazajon dum la kongreso en Ateno kiu tiom konsternis kaj ankaŭ klarigis min, ke mi devis nepre adresi al vi tiun ĉi leteron. Temas pri arbitra ago de via kunlaboranto al kiu vi konfidis, inter aliaj, la ellaboron de la nova Statuto, s-ro Moritz; ago lia kiu ne nur estis ekster ĉia ajn kompetenco de la kongreso, sed ĝi estis ankaŭ provoke ofenda kontraŭ mia lando. Grekujo. Vi ja scias ke tiu sinjoro pendigis sur iun muron de la kongresejo mapon en kiu estis montrata la turka minoritato en nordorienta parto de Grekujo. Do, tiu turka minoritato, laŭ s-ro Moritz, estis subpremata de la grekaj aŭtoritatoj! kaj ne nur tio ĉi. Temo pri subpremado de etnaj minoritatoj estis pridiskutota en la komitato.

Sed ankaŭ en Tesaloniko okazis la sama historio dum la kongreso de la junularo. Tie la... bonvoluloj iris pluen: ili kaŭzis diskutadon kaj subskribon de protokolo pri subpremado de etnaj minoritatoj, inter kiuj ankaŭ tiu de la turkoj en Grekujo! Pri tiu ĉi vere monstra ago mi faros detalan esploron kaj mi agos konforme.

Nun mi revenas al Ateno.

La menciita estrarano vidis la mapon kaj deprenis ĝin. Moritz ekkoleris kaj okazis epizodo, al kiu alkuris kaj intervenis s-ro Tonkin por nur senkulpigi, se ne por aprobi la agon de s-ro Moritz; same kondukis s-ro Szabo; kaj nur s-ro Sadler ne aprobis, sed ankaŭ ne malaprobis.

Verŝajne, karaj samideanoj, tia ago, kiel la supra, estas pure politika kaj, evidente, kontraŭstatuta; sed ankaŭ ege malĝentila kontraŭ lando kiu gastigis vin. Kaj ĉar ĝi jam okazis kaj, laŭ miaj informoj, la menciita germano senhonte publikigis ĝin en gazeto, de li eldonata, mi permesas al mi demandi lin: Ĉu la sinjoro scias, ke la turka minoritato en la orienta Grekujo estis komence 50.000 individuoj kaj nun ĝi pligrandiĝis al 150.000? Ĉu pro subpremado okazis tia florado de la turka popolo en mia lando? Kaj ĉu vi scias, ke en la turka Konstantinoplo estis komence 160.000 grekoj kaj nun estas nur 8.000! Kion tio ĉi signifas sinjoro? Ĉu, Ho, ne estas evidenta subpremado de la greka minoritato fare de la turkaj aŭtoritatoj? Kial vi ne signis tion en via mapo? Kaj ĉu vi ne scias aŭ ignoras la teruran pogromon de la turkoj kontraŭ grekoj en Konstantinoplo en la jaro 1956? Kaj kial vi silentis, dum vi volas prezenti vin patrono doloranta pro la suferoj de la kompatindaj minoritatoj kaj etaj popoloj, pri la barbara invado de turkoj en la insulon Kipros? Invado dum kiu ili mortigis kaj forkondukis kiel sklavojn milojn da grekoj, forrabis riĉajn havaĵojn de la malfeliĉaj grekaj loĝantoj kaj nun okupas perforte la 40% de la grundo de la insulo kaj 200.000 homoj vivas nun for de siaj hejmoj, en tendoj?

Kaj eble vi ne estas tioma nescianto de la historio, ne tro malproksima, por memori ke dum la unua monda milito la turkoj perfide senhejmigis, forkondukis kaj mortigis la tutan armenan minoritaton de 1.500.000 individuoj. Kaj antaŭ tiaj faktoj vi aŭdacis, profitante la konfidon al vi de la kongreso, kalumnii mian landon, ke kvazaŭ ĝi subpremas la turkan minoritaton! Honton al vi, sinjoro, kaj mi tre bedaŭras ke vi, estraranoj, toleris, ke la sankta afero de Esperanto infektiĝu per politika ago, kaj, notinde, turka perfida propagando kontraŭgreka dum vi estis gastoj en la lando.

Kun mia espero ke vi rekonos vian eraron kaj volos reĝustigi iamaniere la aferon mi restas.

Samideane via
Sokratis Sakellaropoulos
Prezidanto de la
Helena Esperanta Instituto

XI-a INTERNACIA KONFERENCO DE I. L. E. I.

Luksemburgo - 14-24 Julio 1977

La Konferenco okazos en la Eŭropa Kvartalo de Luksemburgo, kie situas la ĉefaj Eŭropaj konstruaĵoj (Eŭropa Parlamento-Konstruaĵo Jean Monnet, ktp.). Ĝi havos lokon en Holiday Inn, Centre Européen - Kirchberg.

Temo de la Konferenco: «LA ESTONTECO DE EŬROPO SEN KOMUNA LINGVO».

Loka organizado: Luksemburga Esperanto-Asocio, S-ro Albert Wickler, 1, rue de Kehlen, L-OLM (Luxembourg).

MALLONGE

SKRIBIS AL NI LEGINTO — S-ro Jean Guillaume, la ĉefdelegito de UEA en Francio, petis nin presigi la sekvantan komunikajon.

«Responde al via rimarko pri la agado de la franca ĉefdelegito en Ateno, mi petas vin diri, ke li ne estis en la ĉambro dum la debato pri GDR, ĉar tiam li devis aranĝi ĉe la franca ambasado la revenon de la korpo de s-ro Budimir, mortigita de greka ŝoforo.»

Tiel estu!

Ci tiu komunikajo alvokas jenan distingon:

1-e S-ro J. Guillaume, *«kiu voĉdonis favore al la akcepto de Centra Laborrondo Esperanto en kultureligo de GDR en UEA»*, agnoskas, ke *«li ne ĉeestis la tiucelan debaton»*.

2-e Tio oficiale konfirmas ekzakte tion, kion ni sciigis en *HORIZONTO* n.º 8 (marto-aprilo 1977).

3-e La skrupulo prezenti ekskuzon pro la foresto (cetere en tia cirkonstanco memkomprenebla) ne tial motivas lian favoran voĉdonon: pri tiel grava punkto, kiel akcepto de partipolitika organizajo, la sama skrupulo post tia foresto devus esti instiginta lin almenaŭ al singarda sindeteno! Kaj des pli prave, ĉar li estas iama estrarano de UEA, multjara A-komitatano* kaj longsperta ĉefdelegito!

J. T.

* Ci-rilate oni rajtas demandi sin, ĉu pro la cirkonstanco graveco la aliĝ-peto de CLEK estis debato-temo en UFE-Kongreso.

POR PAROLI ESPERANTE KUN LA TUTA MONDO...

Lingvon oni antaŭ ĉio parolas, kaj la skribado venas nur dualoke. Por esperanto, ŝajnas esti la malo: ni havas ĝenerale pli da okazoj skribi ol paroli ĝin, kaj tion ni povas bedaŭri. Sed nun la modernaj t.n. aŭdvidaj teknikoj ebligas pli da parolo ol en la antaŭaj jaroj. Pli kaj pli da homoj posedas nun magnetofonon. Kial ne uzi tion por paroli nian karan lingvon? Ekzistas nun io, kio ebligas al ni tiajn parolajn kontaktojn.

Estas klubo en Usono, kies membroj, loĝantaj en 34 landoj, deziras korespondi per sonbendoj aŭ kasetoj. Kelkaj el ili mencias esperanton inter la lingvoj, kiujn ili parolas. Tre bone por ni, sed ne sufiĉe! Estas necese, ke multe pli da esperantistoj partoprenu en tiu mondskala rondo. Tial mi nun klopodas konigi tiun klubon al la samideanoj ĉiulandaj, sendante artikolon pri ĝi al multaj gazetoj.

Mi estas certa, ke se ĉiuj esperantistoj scius, ke tiu klubo ekzistas, preskaŭ ĉiuj, kiuj posedas magnetofonon, aliĝus, kaj tio havus du avantaĝojn: unue, la samideanoj havus pere de la Klubo voĉajn kontaktojn inter si; due, la neesperantistaj

membroj de la Klubo konstatus, ke esperanto estas tre disvastigita kaj multaj el ili, serĉantaj homan kontakton sed ĝenataj per la lingvaj baroj, eklernus nian lingvon.

Kaj por tiuj el ni kapablaj paroli aliajn lingvojn, estus facila maniero fari propagandon por esperanto en medio tute preta akcepti ĝin! Ni devas konscii pri la oportuneco de tiu klubo kaj laŭeble aliĝi al ĝi, tiom pli, ke la aliĝkotizo estas tre malalta (nur 4 usonaj dolaroj jare) kaj la avantaĝoj, kiujn ĝuas ĉiu membro, tre allogaj kaj preskaŭ nekredeblaj kompare kun la modereco de la agenda kotizo!

Ĉiu aliĝinto ricevas kompletan adresaron de ĉiuj membroj en la tuta mondo (64 grandaj paĝoj) kaj ĉiun trian monaton, interesan gazeton en la angla lingvo, kiu enhavas suplementon kun la adresoj de la novaj membroj.

La nomo de tiu klubo, «THE VOICES-PONDENCE CLUB», signifas «Voĉa Koresponda Klubo» (el la angla vorto «voice» = voĉo).

La fakto, ke la adresaro kaj la kvaronaraj bultenoj estas en la angla, ne devas esti baro por la esperantistoj, kiuj ne sciopovas ĝin, ĉar mi proponis al la Sekretario de la Klubo esperantistan kunlaboradon, kiun li entuziasme akceptis. Mi faris esperantlingvan tradukon de la dokumentoj de la Klubo kaj la neesperantista peranto por kontinenta Eŭropo multobligis ĝin por la esperantistoj.

La Klubo estas ja tute preta akcepti nin: tian okazon ni ne devas preterlasi! Tial mi konsilas al vi aliĝi al tiu tre interesa klubo kaj profiti ĝiajn servojn. Tion vi certe ne bedaŭros!

Mi staras je via dispono, se vi deziras pliajn informojn.

Daniel Luez

1, rue Victor-Faglain
F 02000 LAON (Francujo)

KIEL FUNKCIAS «LINGVOPONTO»

Esperantoklubo «Lingvoponto» nomiĝas la esperantista societo, fondita 1970 en Kuopio, Finnlando. Ĝi estas unu el la plej viglaj esperanto-societoj en la tuta mondo.

Ĝam en la komenco ĝi disvolvis senprecedantan agadon, sinbazante sur la granda socio. Ĝi ne volis vegeti sur la kotizantoj, sed sin turnis tuj al la granda publiko: oni kolektis reklamojn de industriaj kaj komercaj kompanioj kaj tiel oni financis belan 16-paĝan informilon pri la internacia lingvo, kiun oni amase disdonis okaze de libroekspozicio.

Aŭtune 1971 Lingvoponto eldonis novan etformatan broŝuron pri Esperanto. Samtempe ĝi eldonis du tabloid-formatajn gazetojn kun 8 paĝoj en respektive 24.000 kaj 23.000 ekz. kaj disdonigis ilin en ĉiun hejmon de Kuopio. Rezulte venis tiel multaj lernantoj al la kurso, ke ne sufiĉis seĝoj en la klasĉambro, nur kvindeko havis la ŝancon.

Somere 1972 inundis en la urbon pli ol 300 eksterlandanoj, estis impona kongreso de SAT. Tio vekis eĉ sur la regna nivelo rimarkindan atenton.

Lingvoponto fondis ankaŭ la propran bibliotekon, parte helpe de donacoj, parte mem aĉetante valorajn verkojn. La biblioteko nombras ĉ. 700 volumojn.

Kunlabore kun la urba turista oficejo aperis jam tri eldonoj de la urba kolora faldfolio.

En la loka gazetaro aperis pluraj dekoj da artikoloj pri la klubaj aktivadoj, kaj la klubo zorge konservas ĉiujn eltonda-

jojn pri si mem kaj Esperanto en sia albumo.

La klubo aranĝis plurajn Esperanto-ekspoziciojn en la urba biblioteko. Lastfoje vintre 1977 estis metita notkajero sur la montrotablo, por ke la interesatoj povu noti sian nomon kaj adreson. Entute ĉ. 100 personoj skribis sian nomon kaj al ili estis sendita aldona informo materialo.

La lasta sukceso estas la enkonduko de Esperanto en la someran universitaton de Kuopio!

J. Leporo

TRA LA ESPERANTO GAZETARO

AŬ SED KROM TIO, KIEL KONATE, ĈIO IRAS GLATE!

De LA MONDA LINGVO-PROBLEMO aperis la numero 17 (vol. 6): en ĝi la redaktoro Richard E. Wood anoncas, ke «*ekde vol. VII, n-ro 1 (tuta numero 19) ĉi tiu revuo havos la nomon LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO*». Uf! Feliĉe, ĉar de nun oni povus timi konfuzon kun la revuo antaŭe bone redaktorita de Victor Sadler! La ĵusa numero ja ne altigis ĝian prestiĝon: el la ses komunikaĵoj la sola franclingva brilas precipe per solecismoj kaj neĝustaj vortoj!... Aliflanke per tiu nova titolo oni — kiel same tempe IALA — forlasas la originan celon por gapvagi tra ĝenerala lingvistiko kaj interlingvistiko: kien iras la esperantologio? Sed krom tio, kiel konate, ĉio iras glate!

—oOOo—

En sia numero 4/5 de marto 1977 HEROLDO «*petas pardonon... pro preseja koboldo*»; sed — mirinda koincido! — en l'esperanto januaro-77* la sama «*koboldo*» pri la geografia situo de la franca urbo Bulonjo-ĉe-maro enŝoviĝis en la saman artikolon de Renato Corsetti! Kredende, ke temas verŝajne pri italdevena petolema «*koboldo*»!

Kaj en la 6-a numero (4 aprilo) peco da «*karnavala prozo*» (almenaŭ de HEROLDO mem tiel titolita) anoncas la aperon ĉe PILO-PRESS de satira kvarpaĝa gazeteto: «*BERVERALA KURIERO*». Verfakte la redaktoro de ĉi tiu revueto de la nova Mal-neŭtrala Bervala Esperanto-Asocio montras, ke abrupte mankis al li lia kutima, tradicie Bervaleca inspiro. Kelkaj el la membroj de Ciesurba Esperanto-Grupo sugestis, ke tion kaŭzis ĝenerala striko de la bervaliaj inoj laŭ la modelo de Lizistrata. Sed la plimulto opiniis, ke tia supozo ne povas persisti post serioza konsidero de la situacio en Bervalio: ĉiuj ja bone scias, ke jam de 1974 ia ajn striko ne estas imagebla en la nova Bervala Popoldemokratio! Cetere la «*karnavala*» prozospeco estas nur tia deliraĵo, ke pluraj eĉ ne hezitis demandi sin, ĉu ĝi ne estus rezulto de la nun fame konata kuracmaniero en la psikiatriaĵaj aziloj de tiaj reĝimoj. Sed krom tio, kiel konate de la Estraro de UEA, ĉio iras glate!

—oOOo—

STARTO 1977-1 emfaze prezentas «*la IX-an Konsultiĝon de Esperanto-organizaĵoj de eŭropaj socialismaj landoj*»; — kio okazis de la 14-a ĝis la 16-a de decembro 1976 kaj kion ĝi titolas «*Jubilea konsultiĝo en Moskvo*». Kompreneble «*la konsultiĝo estis riĉa laŭ sia programo kaj perfekte organizita*»; ja ĝi interalie aŭskultis kaj «*pridiskutis*» (?) raportojn pri: «*— 1/ Internacia situacio kaj rolo de progresema esperanto-movado en porpaca batalo, internacia kunlaboro kaj efektivigo de interkonsentoj de la Fina Akto de Helsinki-konferenco /1975/; — 2/ Sesdekjara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio; — 3/ La Tutmonda Asembleo de Packonstruantoj en Varsovio /1977/...*». Sekve «*la 90-a datreveno de naskiĝo de Esperanto*» kaj «*la 60-a datreveno de la morto de d-ro L. L. Zamenhof*» tiel troviĝas ligitaj kun la 60-a datreveno de la Oktobra Revolucio. Krome «*la partoprenantoj sendis saluttelegramon al Ĝenerala sekretario de KPSU L. Breĵnev okaze de lia 70-a naskiĝtago*».

Memorinde, ke tiuj konsultiĝoj inter Bulgario, CSSR, GDR, Hungario, Pollando, USSR cele al rekta politikigo de la movado ekoĉasis nur en la jaroj, kiuj sekvis tiun de la fama DEKLARACIO DE TYRESO. Nu supozu, ke ĉiuj asocioj de la okcidentaj eŭropaj landoj de nun kunvenis en apartaj konsultiĝoj por pritrakti kun usonaj esperantistoj la n-an datrevenon de la Atlantika Pakto kaj sendus telegramon al la Usona Prezidento Jimmy Carter: kion oni aŭdus de Moskvo? kaj al kio do kondukus tiaj konsultiĝoj laŭdire pri «*paco kaj sekureco por la popoloj*»? Ĝuste tiel similan aranĝon faras la asocio de la orienteŭropaj landoj, kiuj jam de 1970 ekrompis la movadon en du partojn. Sed krom tio, kiel konate de Humphrey Tonkin, ĉio iras glate!

—oOOo—

BUDAPEŝTA INFORMILO 1977-marto reprenis el PILO-PRESS n.º 2 la raportojn pri la januara estrarkunsido de UEA: unu belan pecon de memkontenteco! «*La Estraro... rimarkis, ke la laboro de la Asocio bone evoluas sur ĉiuj kampoj.*» Kaj verŝajne tial estos nun du «*direktoroj*» anstataŭ unu (V. Sadler cedos sian seĝon al M. Nevan!); eĉ baldaŭ venos eble tria en la ofico de Konstanta Kongresa Sekretario, kiun nur «*momente ple-numas d-ro Sadler kun helpo de s-ro Milojeviĉ.*» Dume la «*aerpoŝta sendado de la revuo al ĉiu membro ekster Eŭropo sen aldona pago*» estas «*kompensita*» per plialtigo de la kotizoj «*je verŝajne 10 %*»! Kaj «*oni kun plezuro... decidis daŭrigi la pozitivan politikon... pri eventuala kolektiva abonado de la revuo.*» Evidente, kiam ĉiuj legos nur unu revuon, ili aŭdos nur unu sonoriladon! «*La Estraro decidis signife koncizigi... sian raporton:*» ju pli mallonge, kompreneble, des malpli da kritikoj! Kaj «*estontece la informoj pri delegitoj aperos nur en la Jarlibro.*» Tiel certe malpli vidigos la malkresko de la UEA-membraro! Sed krom tio, kiel konate, ĉio iras glate!

—oOo—

Divenu, pri kio temas la elsendoj de RADIO ROMA-ESPERANTO sub la gvidado de d-ro Renato Corsetti. Hej! Pri junularaj protestoj! «*...Kunvenis al Romo pluraj dekmiloj da gejunuloj — estas emfazite en unu elsendo — gejunuloj, kiuj kondukis en la Roma centro kiel veraj gerilanoj, pafante, atakante policajn staciojn kaj ĝendarmajn kazernojn, forŝtelante varojn el la vendejoj (laŭ la tiel nomita «proleta butikumado»), starigante barikadojn, detruante aŭtomobilojn.*» (El SAT-AMIKARO 1977 april-majo**.) Ĉu ĝuste pro tiaj «heroaj» R. Corsetti prirevas transformi la «*propagandantojn kun praktikaj interesoj*» en taĉmentojn da «*pacaj gerilanoj****»?

Dume celtrafaj analizoj de la numeroj 3 kaj 4 de HORIZONTO estis publikigitaj en la n-ro 392 (1977-januario) de NOVZELANDA ESPERANTISTO kun la jena konkludo, kiu substrekas la cenzuritan staton de pluraj gazetoj: «*Bedaŭrinde, estas nun necese aboni 'Horizonto'n por vere ekscii kaj kompreni la movadan politikon entute, ĉu aŭ ne oni subtenas unu 'partion' aŭ la alian.*» Ni menciuj, ke staras la demando ne pri «partio» sed pri principo: ĉu resti aŭ ne resti... neŭtrala? Sed krom tio, kiel konate, ĉio iras glate!

J. T.

* Bulteno de la Itala Esperantista Federacio.

** En la sama numero aperis ĝusta informo pri la 3-a Internacia Konferenco de NEM kaj la revuo HORIZONTO.

*** Relegi en HORIZONTO n.º 9, p. 71.

Vespere la lasta prelego de la prelegserio prezentata de
PROF. D-RO F. HOERBURGER, Universitato de Regensburg, kaj
DOC. BIRTHE TRÆRUP, Universitato de Kopenhago,

Internacieco kaj nacieco en lingvo kaj muziko.

JAŬDE: Antaŭtagmeze **Generala diskuto** pri la temaro de la prelegserio pri la lingva problemo en Eŭropo.

Posttagmeze **Gvidata vizito al la muzeo Louisiana** en Humlebæk, la muzeo de moderna arto kun internacia reputacio.

Vespere akcepto de **Rezolucioj de la Konferenco.**

VENDREDE: Tuttaga ekskurso al Elsinoro kaj la mondfama kastelo **Kronborg.**

SABATE: Fermo de la konferenco.

3. KOTIZOJ

La nun validaj konferencaj kotizoj estas:

Konferencan(in)o	150 dkr.
Geedza paro	200 dkr.
Junu(in)o 15-25-jara	100 dkr.
Junul(in)o malpli ol 15-jara	senpage
Blindul(in)o kaj ties akompanant(in)o	senpage

Pri pago de kotizoj vidu la instrukciojn sur la aldonita **Aliĝilo.**

4. LOGADO EN LA ALTLERNEJO

Pri tio legu la aldonitan aliĝilon, al kies informoj aldonu, ke infanoj ĝis 10-jaraj pagos nur la duonon, do 490 dkr. por la tuta konferenca semajno (minimuma antaŭpago 75 dkr.). Se oni deziras logi en la altlernejo nur kelkajn el la konferencaj tagoj, bonvolu kontakti la Organizan Komitaton, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando. — Dezirante vegetarajn manĝaĵojn, oni notu tion sur la aliĝilo.

3-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Humblebæk, Danlando, 23-30 julio 1977

Korespondadreso: cand. oecon. H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando

OFICIALA INFORMILO N-RO 6

Serve al novaj legantoj de **Horizonto** la Organiza Komitato ripetas kaj suplementas la informojn donitajn en la antaŭaj Oficialaj Informiloj.

1. KONFERENCEJO

La ideala kadro de la konferenco estos la **Altlernejo Krogerup** (dane: Krogerup Højskole) en Humlebæk apud la bordo de la markolo Sundo (inter Danlando kaj Svedio), 36 km norde de Kopenhago kaj 8 km sude de Elsinoro (dane: Helsingør). La tiea regiono, Norda Selando, estas unu el la plej ravaj partoj de Danlando kun arbaroj, lagoj, fekundaj kampoj, idiliaj vilaĝoj kaj admirindaj kasteloj. Laŭ la norda bordo, ĉe la maro Kattégat, etendiĝas sablaj banstrandoj.

La altlernejo situanta en bela naturparko havas kiel centron la palaceton de Krogerup, konstruitan en 1779, kies interno estas bone adaptita por altlernejaj celoj. Novaj alkonstruitaj, moderne ekipitaj domoj enhavas la loĝocambrojn de la lernantoj k.c., kaj dum la konferenco ili gastigos la konferencanojn.

2. PROGRAMO

La programo de la konferenca semajno de sabato la 23-a de julio ĝis sabato la 30-a de julio estos (kun rezervo pri ŝanĝoj kaj aldonoj):

SABATE: Posttagmeze alveno de la konferencanoj. **Instruista kunveno.** Prezento de la altlernejo kaj ĝia parko.

Post la vespermanĝo **Interkona Vespere** enkondukita per prelego de la prezidanto de **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.**

HELMUT SONNABEND pri la temo Ĝis kiu grado la eksperimenta instruado de Esperanto povas helpi la enkondukon de tiu lingvo en la lernejojn de Eŭropo?

DIMANĈE: Antaŭtagmeze **Inaŭguro** de la konferenco kun elekto de prezidantaro kaj sekretario kaj festparolado enkonduke al la diskutoj pri **Ideaj aspektoj de la esperantismo en la lumo de la aktuala krizo en la Esperanto-movado.** Parolos

PROF. D-RO IVO LAPENNA pri Esperanto — ĉu nur instrumento de komunikado, disigebla de **Humaneca Internaciismo?**

Posttagmeze daŭrigo per prelego de

JEAN THIERRY pri **Etikaj valoroj de la esperantismo** sekvota de diskutado.

Vespere **Balo.**

LUNDE: Antaŭtagmeze kaj posttagmeze **Ĝeneralaj kunvenoj pri Organizaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.** En la temaro estos i.a.: Situacio de la revuo **Horizonto**, Agadgrupoj, Harmoniigo de la agadoj en Eŭropo, 4-a Internacia Konferenco de la NEM.

Posttagmeze ankaŭ (16.00 h.) **Kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.** Vespere **Junulara Vespere.**

MARDE: Antaŭtagmeze komenco de la prelegserio **La lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj de Eŭropo.** Ĉiu prelego daŭros 45 minutojn kun posta 15-minuta diskuto. Je la fino de la serio (ĵaŭde) estos ĝenerala diskuto. Prelegos

PROF. D-RO IVO LAPENNA, Universitato de Londono,

Enkonduko pri la ĉeftemo.

EKSTERORD. PROF. D-RO F. PENNACCHIETTI, Universitato de Venecio,

La internacieco de Esperanto kaj la karaktero de la hind-eŭropaj elementoj en ĝi. Vespere propono pri akcepto de la **Manifesto 77 de la Esperanto-Movado** — por Paco en Libereco — por Libereco en Paco.

MERKREDE: Antaŭtagmeze daŭrigo de la prelegserio. Prelegos

PROF. D-RO H. FRANK, Instituto de Kibernetika Pedagogio, Paderborn,

Strategio oficialigi la Internacian Lingvon en la estonta Eŭropa Federacio.

DIPL. MAT. H. D. MAAS, Universitato de Saarbrücken,

Ĉu komputero povas helpi al solvado de la lingva problemo en Eŭropo?

Posttagmeze kunveno de membroj de la Akademio de Esperanto.